

pola

sendependa revuo  
de polaj esperantistoj

# esperantisto

fondita en 1906 ★ n-ro (26) 2/2007 ★ ISSN 0032-2431

---



2  
2007

## Enhavtabelo:

---

|       |   |
|-------|---|
| 1     | <b>Simplaj homoj...</b><br><i>Kazimierz Leja</i>  |
| 2     | <b>Atesto</b><br><i>kard. Stanisław Dziwisz (Tomasz Chmielik)</i>                           |
| 5     | <b>La disrompita mondo</b><br><i>Lidia Ligęza</i>   |
| 11    | <b>La imperiestro (Cesarz) — fragmentoj</b><br><i>Ryszard Kapuściński (Tomasz Chmielik)</i> |
| 15    | <b>Kamizolo (Kamizelka)</b><br><i>Bolesław Prus (Danuta Kowalska)</i>                       |
| 21    | <b>Portreto de la virino</b><br><i>Irena Szanser</i>  |
| 23    | <b>Dekalogo de liberalulo</b><br><i>Bertrand Russel (Stanisław Śmigielski)</i>              |
| 24    | <b>Mia vojaĝo en Esperanto-lando</b><br><i>Urszula Kwaśniewska</i>                          |
| 25    | <b>La prepozicio EL en praktika uzado</b><br><i>Czesław Baranowski</i>                      |
| 27    | <b>Neniu UK en Moskvo 2009</b><br><i>Libera Folio</i>                                       |
| 28-32 | <b>Primovadaj aferoj</b><br><i>diversaj aŭtoroj</i>   |

---

Frontpaĝe: Krakovo, Matejko-Placo. Loko de nova sidejo de ILEI en Pollando  
Dorspaĝe: mozaiko de Esperanto-aranĝoj en Pollando.

---

Kazimierz Leja

## Simplaj homoj...

Skribante ĉi tiujn vortojn mi rigardas la kalendaron... la 2<sup>an</sup> de aprilo rememorigas al mi tiun gravan tagon, kiu forprenis de ni iun karan, bonan, admiratan... Kaj denove, kiel en la jaro 2005, lanĉinte televidilon, preskaŭ pri nenio alia mi povas spekti kaj aŭdi. Ĉu oni nomumos Lin sankta tuj, aŭ nur benata?

Antaŭ du jaroj mi (kaj aliaj) demandis: ĉu la morto de papo Johano Paŭlo la II ŝanĝos korojn de tiuj, kiujn tiom forte trafis Lia forpaso? Ĉu bonaj emocioj en homaj koroj dum tiuj tagoj de funebro, plu daŭros kaj kreskos?

Granda Homo forpasis, grandaj problemoj restis en la tuta mondo. Aldone al la jam komenciĝintaj kaj daŭrantaj sen-sencaj militoj kaj sociaj maltrankviloj aldoniĝas novaj, kies spektantoj denove ni estos, starante apude, sen povo decidi pri ili. Ni, simplaj civitanoj, povas nur esprimi siajn opiniojn, eventuale protesti, esperante, ke tio povas ĉe iu ajn decidanto vekti intereson. Preskaŭ ĉiam okazas male...

Ne rigardante la mondajn problemojn, en nia vilaĝo „Esperantujo” ankaŭ problemoj ne mankas. Kaj ofte, kiam esperantistoj postulas, opinias aŭ protestas, ili (ni) povas kalkuli je meznivela interesiĝo de la gvidantoj, kiuj — anstataŭ kunveniĝi maltrankviliĝintojn kaj serioze preparoli la aferojn — elektas batali kontraŭ ili,

diskonigi falsajn opiniojn aŭ eĉ manipuladi faktojn, kaj akuzante ĉiujn, mem gardis siajn postenojn (vidu la *Deklaron* de poznanaj esperantistoj, paĝo 29).

Malfacile estas skribi tiujn vortojn, tiom pli, ke mi scias, kio poste okazos...

Tiom pli, kiu havas kaj volon kaj fortojn por agi, agu! Ne kontraŭ, sed por. Ni organizu niajn lokajn imprezojn, informante pri ili ĉiujn eblajn mediojn, invitante pli kaj pli da interesaj homoj (ne nur esperantistojn). Ni serioze pripensu la devon instrui Esperanton antaŭ ĉio alia, ankaŭ la perfektigajn kursojn por niaj membroj. Nur flua regado de la lingvo internacia pere de ĝiaj uzantoj povos garantii, ke iu ajn interesiĝos pri ĝi serioze. Ne apelacioj, ne defendo de radio-programoj, sed lingva kaj kultura kresko havas povon konvinki nekonvinkitajn. Ni konas ja tiujn demandojn: „Do Esperanto ankoraŭ vivas?”, „Ĉu iu uzas ankoraŭ tiun lingvon?” — kiuj tiom ofte estas aŭdataj en nia lando. Ni fortigunian esperantistaron per konkreta laboro, direktita al ilia (= nia) kresko. Historion ni lasu al historiistoj por pli favoraj tempoj...

Okaze de proksimaj Paskaj Festoj mi deziras al Vi ĉiuj pli da paco en niaj: koro, lando kaj Movado, dediĉante — kiel ĉiam — la enhavon de ĉi kajero de PE al ĉiuj pensantaj Legantoj. ♣

## Kardinalo Stanisław Dziwisz

## Atesto

el la ĉapitro: „Lasu min forpasi al la Sinjoro” (fragmento)

[...]

En la Paska Dimanĉo la Sankta Patro volis almenaŭ diri la benon *Urbi et orbi*. Diligente li preparis sin por tio, momenton pli frue li provis ripeti benovortojn kaj ŝajnis, ke okazos bone. Tamen poste, kiam finiĝis la parolado de kardinalo Sodano, tralegita sur la placo, la Papo, staranta en la fenestro, ne povis aŭdiĝi la benon pro kortuŝo aŭ sufero. Li flustris: „Mi ne havas voĉon”, kaj poste, en silento, li faris trioblan krucosignon, salutis amason da kredantoj kaj per rigardo komprenigis nin, ke li volas foriri de la fenestro.

Li estis plena de emocio, amariĝinta, kaj samtempe elĉerpita per vana klopodo. La homoj sur la placo aplaŭdis kortuŝitaj, vokis lin, kaj li sentis la tutan pezegon de sia malforteco kaj sufero. „Ŝajne okazus pli bone, se mi estus mortinta, kiam mi ne povas daŭrigi la mision destinitan al mi”. Mi volis respondi, kaj li aldiris: „Estu Via volo... Totus Tuus”. Estis nenia rezignemo, sed plena subiĝo al la Dia volo.

Merkrede, la 30<sup>an</sup> de marto, la Sankta Patro reaperis en la fenestro. Sur la placo ariĝis kvin miloj da gejunulo el la Milana arkidiecezo, venintaj por konfesi sian kredon. Ĉiuj opiniadis, estis ankaŭ mia opinio, ke li devus nur beni. Sed kiam li

faris tion, per decida movo li donis signon per la mano, ke oni alŝovu mikrofonon al li. Li volis diri kelkajn vortojn. Almenaŭ unu vorton. Almenaŭ danki. Sed el lia buŝo aŭdiĝis neniu sono. Malproksimiĝante de la fenestro, li jam ne havis sur la vizaĝo tiun esprimon de malforteco, kiu estis videbla en la Paska Dimanĉo. Li jam sciis, li estis preta...

Sekvatage, ĉirkaŭ la 11<sup>a</sup> horo, li celebris la Sanktan meson en la kapelo. Subite ni havis impreson, ke io kvazaŭ disŝiras lian korpon interne. Febro atingis kvardek gradojn. La kuracistoj tuj prezentis sian diagnozon, ke okazis tre grava sepso ŝoko kunigita kun kardio-vaskula kolapso pro uretrito. Ĉifoje ne estis parolinde pri enhospitaligo. Mi rememorigis al profesoro Buzzonetti la klaran deziro de la Papo, ke neniam plu li revenu al la malsanulejo. Li volis suferi kaj morti hejme, proksime al la Tombo de Sankta Petro. Ankaŭ hejme la kuracistoj povos aranĝi necesan flegadon.

Johano Paŭlo la Dua restis en sia ĉambro. Sur la muro kontraŭ la lito pendis la bildo kun suferanta, ligita Kristo. Apude la bildo kun Ĉenstoĥova Dipatrino. Sur la tableto la foto de liaj gepatroj. Por la fino de la Sankta meso, kiun mi legis, ĉiuj alproksimiĝis kaj kisis la manon.

„Staĉjo” — li diris, tuŝante mian ka-

pon. Poste venis la monakinoj, dum jaroj mastrumantaj hejme, kiujn li nomis unu post la alia, kaj fine — la kuracistoj kaj flegistoj.

La vendredo estis preĝotago: ni legis la Sanktan meson, la Krucvojon, la Trian Horon el la Liturgio de Horoj. Tadeusz Styczeń, proksima amiko de Karol Wojtyła, tralegis kelkajn fragmentojn el la Sankta Skribo. La stato de lia sano estis kriza. La Sankta Patro aŭdigis kun granda peno nur kelkajn silabojn.

Venis la sabato de la 2<sup>a</sup> de aprilo.

Mi dezirus rememori ĉion.

En la ĉambro regis la etoso de granda spiritsereno. La Sankta Patro benis la kronojn por la bildo kun Ĉenstoŭhova Dipatrino en la Vatikana Kaverno, kaj du aliajn sendotajn al la Hela Monto. Poste li adiaŭis la plej proksimajn kunlaborantojn, kardinalojn, prelatojn el la Ŝtatestrekiato, oficejestrojn, krome li volis adiaŭi Franceson, respondecan pri ordo en la apartamento.

Li plu estis konscia kaj kvankam li parolis kun granda peno, li petis, ke oni tralegu por li la Evangelion de Sankta Johano. Ne estis nia sugesto, li esprimis ĉi deziron. Ankaŭ en la lasta tago, kiel dum sia tuta vivo, li volis nutri sin per la Dia vorto.

Pastro Styczeń eklegis la tekston de Sankta Johano, ĉapitron post ĉapitro. Li tralegis naŭ ĉapitrojn. En la libro oni signis la punkton, kiam haltis legado, kaj la punkton, kiam finiĝis lia vivo.

En tiu lasta momento de la migrado surtere la Sankta Patro denove fariĝis tio, kio li ĉiam estis — homo de preĝo. Dia homo, profunde unuiginta kun la Sinjoro, por kiu la preĝo senĉese formis la fundamenton de l' ekzisto. Kiam li devis

renkontiĝi kun iu aŭ fari gravan decidon, skribi dokumenton aŭ komenci vojaĝon, li ĉiam interparolis kun Dio. Antaŭ ĉio li preĝis.

Ankaŭ ĉi-tage, antaŭ ol li foriris en sian lastan, grandan vojaĝon, kun apogo de la personoj arigintaj ĉirkaŭe, li aŭdigis ĉiutagajn preĝojn, faris adoradon, meditado, anticipante eĉ la dimanĉan liturgion de la Horo de Legoj.

Subite fratino Tobiana ekvidis lian rigardon. Ŝi proksimigis la orelon al lia buŝo, kaj li flustris per apenaŭ kaptebla voĉo: „Lasu min forpasi al la Sinjoro”. La monakino elkuris el la ĉambro, ŝi volis diri al ni tion, kion ŝi aŭdis, sed ŝi ploregis.

Nur poste mi ekpensis: grandioze, ke siajn lastajn vortojn li turnis al la virino.

Ĉirkaŭ la 19<sup>a</sup> horo, la Sankta Patro falis en komaton. La ĉambron prilumis nur brilo de la flamanta mortokandelo, kiun li mem konsekris la 2an de februaro dum la solenaĵo al la Dipatrino Kandela.

Sur la Placo de Sankta Petro kaj proksimaj stratoj amasiĝis homoj. Estis pli kaj pli granda amaso, ĉefe venis junularo. Iliaj krioj: „Giovanni Paolo!” kaj „Viva il Papa” atingis la trian etaĝon. Mi estas konvinkita, ke ankaŭ li aŭdis tion. Li ne povus ne aŭdi!

Alproksimiĝis la 20<sup>a</sup> horo, kiam subite mi eksentis internan bezonon celebri la Sanktan meson! Tiel mi faris kune kun kardinalo Marian Jaworski, ĉefepiskopo Stanisław Ryłko kaj du polaj pastroj — Tadeusz Styczeń kaj Mieczysław Mokrzycki. Tio estis Sankta meso antaŭ la solenaĵo al la Dia Karitato, tiel kara por la Sankta Patro. Ni estis plu legantaj el la Evangelio de Sankta Johano. „Kaj kiam estis fermitaj la pordoj... Jesuo venis kaj

staris meze de ili, kaj diris al ili: Paco al vi!"... En la momento de la Sankta Komunio kiel viatikon mi donis al li kelkajn gutojn de la Plej Sankta Sango de Kristo.

Estis 37 minutoj post la 21<sup>a</sup> horo. Ni orientiĝis, ke la Sankta Patro ne plu spiras. Kaj tiam ni ekvidis sur la monitoro, ke ankoraŭ post kelkaj batoj haltis lia granda koro.

Profesoro Buzzonetti kliniĝis super li kaj rigardante flustris: „Li revenis al la domo de la Patro”.

Iu haltigis la montrilojn de la horloĝo.

Kaj ni — samtempe, kvazaŭ je ordo — ekkantis *Te Deum*. Ne *Requiem*, ĉar ne estis funebro, sed *Te Deum*. Dankante Dion pro la donaco, kiun Li havigis al ni, pro la donaco en la persono de la Sankta Patro, Karol Wojtyła.

Ni ploris. Kial ni ne ploru! Ni ploris per larmoj de doloro kaj ĝojo. Kaj tiam oni briligis lumojn en la tuta domo...

Poste mi memoras nenion. Mi havis impreson, ke subite fariĝis mallumo. Mallumo super mi kaj en mi. Klare mi vidis, kio estis okazinta, sed mi ne kapablis allasi ĉi penson al mi. Ŝajne mi ne estis kapabla por kompreni.

Mi fordonis min al la Sinjoro kaj kiam ŝajnis, ke jam plenigas min spiritsereno, reaperadis tiu mallumo.

Kaj venis la momento de la disiĝo.

Ĉirkaŭe grandaj amasoj da homoj. Ĉeestis eminentuloj venintaj de malproksime. Tamen antaŭ ĉiuj lia popolo. Liaj gejunuloj. Kaj tiuj multsignifaj, urĝaj vortoj sur la paneloj. La placon de Sankta Petro plenigis lumo. Tiun lumon mi retrovis ankaŭ en mia animo.

En la fino de sia homilio kardinalo Ratzinger montris la fenestron, parolante ke certe li staras tie, vidas nin kaj benas.

Ankaŭ mi turnis la kapon, ĉu mi povus ne turni! Sed mi ne rigardis supren.

Poste, kiam la portantoj haltis ĉe la enirejo al la Baziliko, malrapide ili turnis la ĉerkon al la kredantoj, ke li povu rigardi la placon lastfoje. Ke li povu adiaŭi por ĉiam la homojn, la mondon.

Ĉu ankaŭ min?

Ne, min ne. Tiam mi ne pensis pri mi. Mi travivis ĉi tiujn momentojn kune kun aliaj. Ĉiuj estis kortuŝitaj, plenaj de emocio. Por mi estis io, kion mi forgesos neniam.

La procesio eniris la Bazilikon. Ili portos la ĉerkon al la kaverno, en la tombon.

Kaj mi ekpensis tiam...

Mi estis kun li preskaŭ kvardek jarojn. Unue dekdu jarojn en Krakovo, poste dudeksep jarojn en Romo. Ĉiam kun li. Ĉe lia flanko. Kaj nun, en la mortohoro, li foriris sola.

Ĉiam mi akompanadis lin, kaj de tie li foriris sola. Plej forte skuis min tio, ke dum tiu vojo mi ne povos akompani lin.

Li tute ne forlasis nin. Ni sentas, ke li estas kun ni. Li petas multajn favorojn pro ni. Kaj mi akompanis lin ĝis tiu momento.

Nun li forpasis sola.

Kaj nun? Sur la transa bordo, kiu akompanas lin?

## El la pola tradukis Tomasz Chmielik

Dziwisz Stanisław kard.

*Świadectwo. Kard. Stanisław Dziwisz w rozmowie z Gian Franco Svidercoschim*

Eldonis: TBA Komunikacja Marketingowa

ISBN: 83-922882-1-3

140x220, paĝoj 232


## La disrompita mondo

**Tadeusz Różewicz** — unu el la plej elstaraj nuntempaj literaturistoj — naskiĝis la 9<sup>an</sup> de oktobro 1921 en Radomsko. Okaze de lia naskiĝdatreveno *Pola Esperantisto* volas rememorigi lian kreaĵon silueton, des pli, ke 85-jaraĝa aŭtoro de multaj poezi-volumoj, prozaĵoj, eseoj kaj dramoj verkas plu, mirinde riĉigante la polan literaturon.

En Radomsko, la loko de sia naskiĝo, Różewicz finis la mezlernejon kaj travivis unuajn jarojn de la hitlerana okupacio manlaborante. Fininte la konspiran ofiĉir-aspirantan lernejon li batalis dum jaroj 1943–44 en partizanaĵo taĉmentoj de la Landa Armeo (AK). Postmilito li studis historion de la arto en la krakova Jagelona Universitato. Sekve li restadis en Gliwice, kaj en la jaro 1968 li ekloĝis en Vroclavo.

En la jaro 1938 Tadeusz Różewicz debutis kiel poeto sur paĝoj de porjunularaj gazetoj. En 1955 li ricevis la ŝtatan premion de la II grado por la poemvolumo „Ebena”. Premiojn por la tuta verkado li ricevis kelkfoje: en 1959 de urbo Krakovo, en 1962 de Ministerio pri Kulturo kaj Arto, en 1966 la ŝtatan premion de la I grado. En la jaro 1970 li gajnis la premion de grava, porkultura monatgazeto „Odra”.

La tuta verko de la aŭtoro estas demando pri la morala konscio de la homo kaj pri lia homeco. La provo priskribi primarajn valorojn, estantaj bazo de vaste kompre-



nata humanismo, igis konsekvencojn por lia poezia lingvo kaj esprimmaniero. Liaj unuaj du poemvolumoj „Malkvietoj” (1947) kaj „La ruĝa ganto” (1948) fiksis la fortikan bazon por lia tuta, pli malfrua verko revenanta al priskribo de efkoj de la milito. Por juna Różewicz milito estis kaptaklismo, simila al la biblia diluvo. Post ĝi jam ne eblas kontinui historion de la homaro kaj de la kulturo laŭ ĝisnunaj principoj. Ĝi estis travivaĵo kaj sperto, kiu detruis ĉiujn hierarkiojn de la valoroj. Ĉar milito ne estas aperaĵo lingva — fariĝis do nepro serĉi specialan lingvon, tamen permesantan paroli pri la nepriskribebela. Deziore nomi la mondon denove kondukis al la konscia memlimiĝo. La poeto fariĝis inventanto de genro de la libera, sintaksa versaĵo, rezignanta de la stiliziga tradicio, de vortornamoj, de muzikeco. Reduktante metaforojn, uzante ordinarajn vortojn, ironion, kontraston, Różewicz kreis lingvaĵon simplan, do la plej veran. Simpligitaj, eĉ kripligitaj formoj, vortoj la plej simplaj, posedas valoron de la vero, vero savita de la milita katastrofo. Tiel naskiĝis poezio, kiu hontas siajn sentojn, poezio de la „sufokita gorĝo”, esprimanta la konvinkon, ke kulturo estas ŝajno, la spiritaj valoroj estas aŭ fikcio aŭ plenumo de la vanaj sopiroj. Poezio, laŭ kiu esenco de la mondo estas frida, absoluta krueleco.



Kurta versaĵo el „La ruĝa ganto” — „La luno lumas” povas servi kiel la tipa ekzemplo de frua poetiko de Tadeusz Rózewicz.

La luno lumas  
malplena strato  
la luno lumas  
homo fuĝas

la luno lumas  
homo falis  
homo estingiĝis  
la luno lumas

la luno lumas  
malplena strato  
la vizaĝo de l' mortinto  
flako de akvo

Ni tuj rimarkas reduktitajn sintakson kaj vortprovizon, paralelojn, kiujn enkondukas tiu ĉi metodo, kontraston inter la tragika okazaĵo — la morto kaj rakonto pri ĝi helpe de senpasia, seka lingvo de la raporto. La plej grava vorto „luno” akompanas ne al amo kaj feliĉo, kion lanĉis pli frua poezio, sed estas atestanto de la murdo, signo de la morto. Ŝpareme konstruita metaforo agas des pli forte: „homo estingiĝis, la luno lumas”. La raporto ne montras apartecon kaj nikecon de la okazaĵo kaj ne pri tio temas. Inverse — ni ne scias kiu kuras, kie kaj antaŭ kiu li fuĝas kaj kiamaniere pereas. La versaĵo fariĝas alegorio de la morto anonima. Ostentacie malpoezia teksto de Rózewicz plu restas akra, malkaŝas novan manieron verki pri la luno, perverse pruvas, ke eblas verki pri ĝi eĉ en nia malsentimentala mondo. Ĉi-bil-

do similas al laboro de la film-kamero: komence ni vidas de malproksimo malplenan straton, poste sur ĝin alkuras homo, kiu falas, kaj finfine — la alproksimigo — la vizaĝo de murdito.

Dum ĉirkaŭ kvar jaroj (1949–53) Rózewicz verkadis poemojn socirealismajn, publikigitajn i.a. en premiita volumo „Ebena”. Li, tute alie ol plimulto da liaj gekolegoj, ne rezignis de ili kaj aperigis la parton en postaj volumoj. En la prozaĵoj li mem konfesis, ke socirealismon li traktis serioze, serĉante en ĝi humanajn kaj humanismajn valorojn kaj honestan „homan vizaĝon”. Finfine tamen ne ĉio estis de li akceptita. „Kiom da eraroj, pekoj, mizero. Tio morta, malplena. Do ĝis tio povas alkonduki batalo kontraŭ poezio — ĝis la gazeta babilaĉaĵo” — opinias la aŭtoro pri volumeto „Versaĵoj kaj bildoj” (1952).

La volumo „Ridetoj” (1955) montras malpli konatan vizaĝon de la poeto. Ĝiaj versaĵoj kaj humoraĵoj satire priskribas bildojn de realeco. Multe da tekstoj rilatas al verkistoj kaj intelektuloj, kiuj kverelas, mordas unu la alian, kutime estas enuiĝintaj kaj laciĝintaj, sterilizitaj kaj malutilaj. Ankaŭ manko de la vera, idea engaĝigo estis tutcerte riproĉinda. Jen la poemo „Aglo” de tiu aro:

Fojfoje mi ekflugas Aglo  
sidas ĉe skribotablo  
mi suprenflugas la teron lasas  
sidas ĉe skribotablo

mi kunpremas pugnojn minacas  
sidas ĉe skribotablo  
per glavo mi distranĉas nodojn  
sidas ĉe skribotablo



Kapitalistojn mi sufokas per vorto  
sidante ĉe skribotablo  
imperialistojn mi batas sur kapon  
sidante ĉe skribotablo

Mi roras kantas sangon verŝas  
sidante ĉe skribotablo  
eble ne roras mi sed oscedas  
sidante ĉe skribotablo

Poezio-volumoj: „Interparolo kun  
princo” (1960) kaj „La vizaĝo” (1964)  
prezantas versaĵojn koncize kaj trafe ski-  
zantajn la spiritan misorientiĝon de la ho-  
mo dronanta en la ĉiutaga mastrumeta-  
do, kaj ĉiutaga sensenca antaŭzorgemo.

Ĝis la jaro 1956 Rózewicz eldonis du  
prozaĵojn: „Eĥoj arbaraj” kaj „Falis fo-  
lio de arboj”. Ili ambaŭ traktas pri la par-  
tizana vivo, sed la dua volumo, ne tiom  
dokumenta, enhavas pli da literaturaj ri-  
medoj kaj estas ĝenre pli kohera. Kur-  
taj rakontbildetoj estas dediĉitaj al kon-  
kretaj personoj aŭ okazintaĵoj. La aŭtoro  
verkis elegie, por omaĝi tiujn, kiuj pere-  
is. Aliaj tekstoj, destinitaj por tiuj, kiuj  
saviĝis, estas gajaj, utiligantaj pli helajn  
rememorojn de la komuna batalado. Pre-  
cipe ĉarma estas rimarko pri tio, kiel ima-  
gas „knabojn el la arbaro tiuj, kiuj vizitas  
arbaron nur por fungoj kaj beroj, kaj nur  
apoge je permeso de la arbaristo”.

Rózewicz sumigante en prozaĵoj siajn  
militajn spertojn estas konvinkita, ke  
agis ĝuste batalante pro la patrujo kaj  
nacio, sed gravas lia tristiga konkludo:  
„mi ne savis sencon de la vivo”. Tiu fra-  
zo restas aktuala ankaŭ por multaj pro-  
zaj volumoj: „La interrompita ekzame-  
no” (1958), „Mia filineto” (1964-66), „La  
morto en malnovaj dekoracioj” (1969),  
„Preparo al la aŭtora vespero” (1973).

Laŭ diversaj, suspektemaj opinioj de  
fakuloj oni povas ekkredi je stultaĵo, ke  
la poeto forstrekis „kulturon ĝenerale”.  
Rózewicz protestas ne kontraŭ kultu-  
raj akiraĵoj de la homaro, sed kontraŭ  
tia ĝia modelo, kiu apogas je lingvaj  
abstraktaĵoj, ŝajnaj valoroj, kio devas al-  
konduki ĝin al atrofio. La poeto defen-  
das valorojn esencajn kaj elementajn,  
tiujn, kiuj formis staton de homeco en  
la tuja, senpera kaj universala sperto.  
La vivo, valoro la plej granda rekontro-  
las ĉiujn aliajn valorojn, kiuj al ĝi servas.  
Ĉe tio ĝi estas rompebla kaj malsolida,  
limigita kaj detruenda. Ĝi estas karna –  
grandioze kaj admire, sed ankaŭ limigi-  
ta kaj sklavigita. Nenio pli gravas ol la vi-  
vo, kiu por si mem determinas la celon  
kaj la sencon. Tion ĝuste rigore propo-  
nas unu el lastaj moralistoj de nia jarcento.  
Inter vivo kaj neniigo de ĝi, inter libe-  
reco kaj sklavigo sur diversaj niveloj de la  
esto etendiĝas la poezia spaco de Tade-  
usz Rózewicz.

La poezia agado de la aŭtoro antaŭ-  
igas liajn dramojn, sed ankaŭ ilin prepa-  
ras. Dramojn malsimilajn al io ajn en la  
nuntempa dramaturgio. Konkretaj, vi-  
voplenaj verkoj konstruitaj tamen kun  
antaŭseno de detruo kaj fino apogas  
forte je lia poezio. Rózewicz strebis verki  
dramojn samtempe realismajn kaj poe-  
ziajn. Montras tion la aŭtoro rimarko pri  
la scenejaj akcesoraĵoj al „Kartoteko”  
(1960). „Ĉiuj objektoj kaj mebloj estas  
veraj. Iliaj dimensioj estas iome pli gran-  
daj ol normalaj”. En praktiko ĉi rimarko  
dtrebas realigi la formulon de multfunk-  
cieco kaj multsignifo. En la klasika dra-  
mo ni observas fabulon, intrigon, kulmi-  
non, peripetiojn ktp., kion ne evitis eĉ  
la dramo avangarda. Laŭ Rózewicz tiaj

dramoj servas al „la ekstera teatro”. Li kontraŭstaras al tiu tradicio kaj provas formi „la enan teatron”. Plenestime kaj plaĉe li akceptas nur du dramverkistojn, nome: Ĉeĥov kaj Beckett. En dramoj de Ĉeĥov valoras por li ne tio, kio okazadas, ne tio, pri kio oni parolas surfone de moroj kaj la historia momento, sed la intense drama malpleno inter la okazintaĵoj, multo inter vortoj, atendado. „Senmovo kaj ne movo estas tie esenco de la arto”. Senmovon preskaŭ surlime de la arto neebla realigas en siaj kurtaj teatraĵoj Beckett. Senmovo kaj malpleno kunligas tiujn tri grandegulojn de teatro, en kies proponoj por sceno la esenco troviĝas inter vortoj, inter okazaĵoj kaj inter homoj. En la ideala, teatra projekto ne ekzistas limigoj. Dramo nek komenciĝas, nek finiĝas. La unuaj vortoj de la teksto fakte ne signifas la komencon, la lastaj ne fermas ĝin. Tiun dramon apertan Rózewicz poste nomos — spite de kaj melankolie — „la teatro de senkonsekvenco”.

„Kartoteko” (1960) akceptita kun interesiĝo, sed ankaŭ kun konsterno – post kelkaj jaroj fariĝis klasikaĵo legata en lernejoj. Tiu modela, tre persona verko proponas heroon kaj dramon kaj lirikan. Li havas multe da nomoj, multe da enkorpiĝoj kaj faras nefacilan bilancon de la epoko kaj de sortoj de generacio, kiu travivis la militon. Ne eblas laŭ Rózewicz honeste montri la homan mondon kiel tutaĵon. Ĝi aperas kiel io, kion ni povas observi nur en disŝutitaj fragmentoj, miksitaj, ne respektantaj hierarkion de graveco kaj valoro, en formo de la kaĉo. Biografion anstataŭas „kartoteko”, kies slipetoj estas kaj tutigitaj kaj disŝutitaj. Senordo de tia materialo igis la laŭvican ne ĝisfine ĝustan rimarkon de la kritiki-

stoj, ke la aŭtoro aplikas „poetikon de la sonĝo”. Tio estus tro facila. Konstruon de „Kartoteko” oni komparis ankaŭ kun la arta tekniko de *collage*. Tamen nun ni preferas nocion *ani-collage*, ĉar *collage* kunmetas diversajn materialojn kaj ties karakterizajn ecojn por pligrandigi la efekton, kaj Rózewicz arigas lingvajn ludojn, ĉifonpecojn de vortaroj, flavigitajn leterojn, artikolojn pri biero, konsilojn el virinaj ĵurnaloj, erojn de tute senutila scio por montri kuriozajn kriteriojn de nia pretigo al la vivo. En tia mekanismo perdiĝas ĉiaj proporcioj kaj historio ne instruas vivi. Sed tamen spite al tiu neordigita ŝuthaldo aperas valoroj — la vivo mem, la naturo, la biologia evidenteco, evidenteco de interhomaj rilatoj kaj varma, kvankam ne plenumita deziro de la interhoma interkompreniĝo.

La dramo „La grupo de Laokoono” (1961) direktiĝas al la nova formulo de kvazaŭ-mora komedio, memkompreneble transformita, ludanta kun konvencioj, aplikanta groteskon. Rózewicz aplikas groteskon ŝpareme, singardeme, alimaniere ol avangardo de 50<sup>aj</sup> jaroj. Neniam ĝi estas baza vehiklo de la tuta ensceniĝo. Apud grotesko oni rimarkas ankaŭ senkompatan parodion. La teatraĵo havas apertan konstruon, konsistas el epizodoj. „La grupo de Laokoono” ŝajnas esti la mora komedio, eĉ familia kaj meda. Kvankam ia medio ekzistas, sed ne ĝi gravas. La aferoj okazadas en familio de historiisto pri arto, spektaklo koncernas al morto de la arto. Patro en la dramo rakontas pri (rigardita cetere kiel la ĝipsa kopio) la titola, fama skulptaĵo, pri belo, vero kaj eĉ sufero, kiujn antikvaj grekoj scipovis montri „en formo harmonioa kaj plena de modero”. La renesanca vi-

zio de la homa mondheredaĵo transdonita en multaj poetikoj de nia tempo tute jam putriĝis. Ĝenerale la arto mortas, ĉar fariĝis malfekunda. Krome detruas ĝin gardistoj de la praveco. Ĉio-ĉi estas bonega materialo por grotesko kaj parodio.

De la alia flanko la dramo koncernas denove problemojn de generacioj. Patro estas suspektinda, vivanta atrapo, falsa martiro en hejmaj pantofloj, jesulo kaj flatulo. Avo, la vera humanisto sentanta la krizon, verdire perdis jam „kredon je belo”, sed tamen plu ŝatas fromaĝon gorgonzola, la plej bonan en la mondo. Sed Filo post multaj provoj trovis la programon: „Mi volas esti mi kaj nur mi. Mi volas trapasi la vivon aŭtente”. Kvankam ĉi tio sonas kiel populara frazero — nenio en ĝi riproĉinda. „La grupo de Laokoono” estas trafe prezentita bildo de la kultura kaj historia situacioj en la 60<sup>a</sup> jaroj de la XX jarcento.

La subtitolo de la laŭvica dramo populariĝis kiel signalvorto de esplorataj de Rózewicz temoj: „Atestantoj aŭ nia malgranda stabileco” (1962). Atestantoj estas ni ĉiuj, Kaj nia malgranda stabileco? Ĝi estas fragila, ŝajna, malaŭtenta, svinganta, sed ni deziras fidi al ĝi, kredi je ĝia daŭro-povo. Konstruo de tiu dramo estas tiom epizoda, ke laŭvicajn ĝiajn partojn ligas nur la kultura situacio. En la unua parto la partneroj (geedzoj) malkovras al la spektanto kaj al si mem breĉojn sur la idilio de ilia kunesto, kiu fakte estas malplena, sterilizita, laciga, indiferenta, plena de la kaŝa antipatio. La lasta parto montras du „atestantojn” malmovigitajn en foteloj, kiuj staras en malaj direktoj. Ili ne deziras akcepti la fakton, ke al ilia sidspaco krablas sin agonian-

ta homo. Ili interparolas transdonante iajn kvazaŭ-informojn kaj kvazaŭ-konfesojn, sed tio estas nur la informa susuro, kiu ne permesas aŭdi la krablanton. La interhoma deco tute kolapsis. Oni devas substreki, ke „nia malgranda stabileco” alportas diagnozon por la globala kulturo. Ĝi estis, estas kaj restos malaŭtenta, ĉar „inversis dorsflanke” de la plej gravaj spertoj de la XX jarcento.

Farita el diversigitaj spece eroj „Akto interrompata” (1964) enhavas elementojn de esejo, felietono, dramo en diversaj variantoj — kune kun avangardaj. Ĝi enhavas ankaŭ spitan traktaton pri „dramaturgio neebla”.

„La ridinda Olduleto” (1964) ne estas monologo, kvankam nur unu persono parolas. Akompanas al li ŝajne malĉeestanta socio ekipita en ecojn, pri kiuj oni povas opinii malakre kaj malklare, ĉar ne eblas distingi unu de la alia. La Olduleto pro emo al malgrandaj knabinoj estas juĝata kaj havas okazon ekvoĉi sian paroladon. Li faras tion antaŭ juĝo konsistanta el manekenoj kaj atrapo, kio montras studaĵon de soleco inter la homamaso. Perversa estas la bildo de la mondo observata de maljuna kaj malmoda homo „kun neplena, mezgrada klero”. La Olduleto, folulo, melankolia duonfuriozulo, ne ĝisfina deviulo kun bremsitaj sferoj de sekso vivas ekster la socio. La parolaĵo, feble kontrolata „torento de la konscio” renkontas agreseman „torenton de la vivo” kaj ne povas ĝin venki.

„Li eliris el la hejmo” (1964) — la dramo duvoĉa, realigata de viro, kiu frapis al si la kapon kaj perdis la memoron. La familio igis lian revenon al normaleco, sed li ne estas feliĉa. Manifestante la preferon reveni al amnezio, al senkonscia rila-

to kun la mondo li bandaĝas al si la sanan jam kapon. La ŝanco liberiĝi de la konscio tamen jam ne ripetigo.

La unuan serion de dramoj Rózewicz fermas per „Spaghetti kaj glavo” (1964) — vere ridinda grotesko, korespondanta kun platigita bildo de milito en la vagona literaturo kaj stereotipa filmo. La romantika heredaĵo aperas en kiĉa kadro. En la globalan, kulturan diagnozon oni enskribis „sindromon de la batalvetterano”, kiu memorigas gloran pasintcon aŭ bedaŭras, ke el polaj alaŭdoj italoj kuiras bulionon!

Post kvarjara paŭzo Rózewicz verkas la dramon „Naskiĝkvanto”. Laŭ li troa kvanto da homoj kondukas al katastrofo ekologia, al ĝangalo de la perforto, kio povas finiĝi per la totala pereco.

„La Olda Virino siddaŭras” (1968) ne estas dramo pri la ekologia katastrofo, kvankam tian minacon la aŭtoro ankaŭ en ĝi fiksas. Oni povas trakti ĝin kiel bilancon de la kultura situacio. En tiu bilanco ni rimarkas perdadon de la homeco, emon naski la idaron sur balaaĵejo, senĉesan homekstermadon, memkompreneble laŭleĝan, pligrandigon de artefaritaj balaaĵejaj valoroj. Ankoraŭ la demando, kiu estas la Olda Virino? Simbolo, Homaro, Patrino Tero, Prapatrino? Ĉiu el tiuj supozoj povas esti ĝusta. Ŝi mem en la dramo konfesas, ke estis jam ĉiu.

En la jaro 1972 Rózewicz verkis la dramon „Al sablon”. Apud „Kartoteko” ĝi estas lia dua aŭtobiografia verko. La ara heroo-taĉmento de la Landa Armeo (AK) similas al taĉmento, en kiu la aŭtoro batalis. La materialo de la teksto konstruita el „koto kaj sango” toleras pli tradiciajn rimedojn. Ni konstatas paŝon al direkto de fabulo kaj ĉeeston de la ar-

bara, aŭtuna pejzaĝo. Tio ne signifas, ke la ĝisnuna maniero konstrui la verkon el bildoj, kiuj sin reciproke trapenetas, ĝis la drasta fino — morto de Valĉjo, estis forgesita.

„La blanka edzeco” (1974) estas la plej konata, samtempe la plej malkomprenata dramo de Rózewicz. Ĝi estas la dramo de la korpo. Malkvietigo de maturiĝ-ago, samtempe timo kaj fascino rilate al erotiko, aro de obtuzoj, alilokigoj, sublimoj kaj agresoj laŭ Freud, kunligas kun motivo de la kontraŭstaro al la ĉirkaŭata realeco. Tiu tipe modernisma motivo estis realigata ankaŭ pli frue, kio verŝajne kaŭzis pripenson de la aŭtoro lokigi la heroojn en biendomo el la XIX jarcento. Ĉiu el ili travivas propran dramon de la korpo, sed precipe atentigas ni la ĉefa rolo de junulino Blanka. Malkvieto kaj „maldecaj” imagoj ege ŝin turmentas. Dramo de la korpo interplektiĝas kun dramo de la oficiala kulturo. Ĝus protestante kontraŭ moroj kaj kutimoj de la epoko ŝi disŝiras vestojn, tondas la harojn kaj en la nudeco serĉas liberigon. Vane.

„Foriro de la Manĝavidulo” (1976), dramo apogita je rakonto de Kafka, kolizias kaj analizas la homajn bezonojn kaj emojn. La heroo elektis vivon en la kaĝo, kiun ni povas kompreni kiel azilo de artisto. Ĉirkaŭ ĝi ruliĝas sanga, kruda, porkeca, naturpotenca vivo de aliuloj. Sed kaĝo estas ankaŭ kaptulo kaj ekzistas ankoraŭ aliaj, neeviteblaj kaptuloj, kion konfirmas en la dramo „Kaptulo” (1979) Franz K.: „Mi estas kaptulo, mia korpo estas kaptulo, en kiun mi enfalis post la naskiĝo”.

El poemoj, noveloj kaj dramoj de Tadeusz Rózewicz elmergiĝas la mondo

Mortinta la 23<sup>an</sup> de januaro 2007 granda pola raportisto Ryszard Kapuściński, dum sia tuta 75-jara vivo akiris pinton de raportistaj kapabloj, fariĝante la plej imitinda fakulo por siaj samtempuloj. Distingita en multaj landoj, estas komparata kun la plej grandaj literaturistoj kaj historiistoj de la mondo. Lia riĉa biografio priskribita de Tomasz Chmielik, pro sia amplekseco plenumus la tutan kajeron de PE. Pro tio ni publikigas ĝin sur la Interretaj paĝoj de la Eldonejo HEJME (la adreso en la kolofono). La teksto troveblas ankaŭ sur la paĝoj de Esperantlingva Verkista Asocio ([www.everk.org](http://www.everk.org)) — red.

**Ryszard Kapuściński**

## La imperiestro (Cesarz)


**(fragmentoj)**

**T.K-B:**  
Kara amiko, jes, mi memoras. Tio okazis preskaŭ en la hieraŭa tago. Preskaŭ en la pasinta tago, antaŭ jarcento. En tiu ĉi urbo, sed jam sur alia planedo, kiu malproksimiĝis. Ho, kiel miksiĝas ĉio — la tempo, lokoj, tiu mondo disfalinta en pecetojn nekunglueblajn. Nur la rememoro estas tio, kio saviĝis, tio, kio restis el mia vivo. Multe da tempo mi pasigis



disrompita je malfinebla vico de fragmentoj. La homo vivanta en tia mondo ankaŭ ekzistas kiel estaĵo konsistanta el eroj. El la vico de faroj kaj instinktoj. Ĉi verkoj montrantaj spiritan staton de la epoko, kiu forprenis de la homo sentojn de ordo, harmonio kaj belo, kaj senĉese vekas lian konsuminklinon kaj bezonon ekscitiĝi pro pli kaj pli novaj, absurde elpensitaj konkretaĵoj — estas trista, situacia diagnozo, sed ankaŭ esperplena averto.

Ĉu ni scipovas ilin utiligi?



ĉe la imperiestro, kiel oficisto en la ministrejo de plumo. Ni komencis laboron je la oka, por ke ĉio estu preta antaŭ la naŭa, kiam venos la monarko. Nia sinjoro loĝis en la nova palaco kontraŭ Africa Hall, kaj siajn oficialajn devojn li plenumadis en la malnova palaco, konstruita de imperiestro Menelik kaj situanta sur la apuda monteto. Nia oficejo troviĝis ĝuste en la malnova palaco, kie estis la plimulto da imperiestraj oficejoj, ĉar Hajle Selasje deziris havi ĉion proksime. Li venadis per unu el dudek sep aŭtomobiloj, kiuj formis lian privatan aŭtoparkon. Li ŝatis aŭtomobilojn, plej alte li taksis rolsrojsojn pro ilia respektinda kaj majesta formo, sed por ŝanĝo li uzadis ankaŭ mercedesojn kaj linkolkontinentalojn. Mi rememoras, ke nia sinjoro venigis aŭtomobilojn al Etiopio kiel la unua kaj ĉiam favore traktis la entuziasmulojn de teknika progreso, kiun, bedaŭrinde, nia tradiciema popolo akceptis malŝate. Nemulte mankis, ke la

imperiestro perdu sian tronon, kaj eĉ vivon, kiam en la dudekaj jaroj li venigis de Eŭropo la unuan flugmaŝinon! Tiun simplan aeroplanon ĉiuj rekonis kiel diablaĵon, kaj en la magnataj kortegoj oni komplotis kontraŭ tiel freneza monarko, preskaŭ kabalisto kaj mago. De tiam nia respektinda sinjoro devis pli atente malbridi siajn pionirajn ambiciojn, ĝis kiam pro la malŝato, kiun vekas ĉia novaĵo en grandaĝulo, li preskaŭ ĉesigis tiujn klopodojn. Do, je la deka matene li venadis al la malnova palaco. Antaŭ la pordego atendis lin amaso da regatoj, kiuj volis transdoni al la imperiestro pet-skribojn. Estis — teorie — la plej simpla vojo serĉi en la imperio justecon kaj bonecon. Ĉar nia popolo ne kapablas skribi, kaj justecon kutime serĉegas nur malriĉularo, ĉiuj ĉi homoj ŝuldiĝis dum jaroj por pagi al la oficisto, kiu skribos iliajn plendojn kaj petojn. Krome aperis protokola embaraso, ĉar la kutimo ordonis al la malgranduloj, ke ili surgenuiĝu antaŭ la imperiestro, kun la vizaĝo turnita al la ĉielo, sed kiamaniere doni el tiu pozicio koverton al la preterveturanta limuzino? Oni solvis la problemon tiel, ke la imperiestra aŭtomobilo veturis malrapide, post la fenestrovitro oni vidis la vizaĝon de la monarko, plenan je boneco, kaj la gardistaro en la sekva aŭtomobilo kolektis parton de la kovertoj el la manoj, kiujn etendis la popolamaso, nur parton, ĉar leviĝis arego da manoj. Se la homoj alrampis tro proksime al la venantaj aŭtomobiloj, la gvardio devis forpuŝi kaj forpeli ĉiujn trudulojn, ĉar la sekureco, kaj ankaŭ respekto por la majesto de la imperiestro postulis, ke la veturo okazu akurate kaj sen prokrasto. Nun la aŭtomobiloj rapidis en la aleo kuranta

supren kaj haltis sur la palaca korto. Ankaŭ ĉi tie la imperiestron atendis amaso da homoj, sed tute malsama ol tiu bando antaŭ la pordego, kun furiozo dispelata de la gardistoj el Imperial Body Guard. La amason, kiu salutis la monarkon sur la korto, formis homoj el la ĉirkaŭaĵo de la imperiestro. Ni kunvenadis ĉi tie pli frue, por ne malfruiĝi je lia alveno, ĉar tiu momento havis por ni precipan signifon. Ĉiu deziris nepre vidigi sin, ĉar li esperis, ke li estos rimarkita de la imperiestro. Ne, li eĉ ne revis pri iu speciala atento: nia respektinda sinjoro rimarkis, alproksimiĝis kaj komencis interparolon. Ne, tio ne okazu jene! Mi parolos sincere — ni deziris almenaŭ iom da atento, por diri la veron — iomete, eĉ iun malgravan, banalan, hastan rigardon, kiu devigas la imperiestron al nenio, sed tian, ke ni sentu poste internan ŝokon kaj ekregu nin la triumfa penso: mi estas rimarkita! Ho, kiel poste tio plifortigis! Kiajn nelimigitajn eblecojn tio prezentis! Ĉar ni supozu, la rigardo de nia respektinda sinjoro traglitis sur la vizaĝo, ĝi nur traglitis! Ĝuste oni povus diri, ke okazis nenio, sed aliflanke — ĉu vere okazis nenio, se ĝi traglitis! Ni tuj sentis, ke la temperaturo kreskas, sango bolas en la kapo, kaj la koro batadas pli forte. Estis la plej bona pruvo, ke tuŝis nin la rigardo de la protektanto, sed tio ne gravas, ĉiuj ĉi pruvoj ne havas nun signifon. Pli gravas la procezo okazinta en la memoro de nia sinjoro. Estis konate al ĉiuj: nia sinjoro ne uzadis la kapablon de legado, nek de skribado, kaj pro tio li havis nekredeble disvolviĝintan vidan memoron. Kaj sur tiu natura kapablo siajn esperojn povis apogi la posedanto de la vizaĝo, sur kiu traglitos la imperiestra pupilo. Ĉar li jam



estis certa, ke iu malfirma spuro, eĉ se nur ĝia malakra ombro depremiĝis en la imperiestra memoro. Li devos nun kun persisto kaj malcedemo tiel moviĝi en la homamaso, tiel sin trapuŝi kaj tragliti, tiel alŝoviĝi kaj alrampi, por fojfoje vidigi sian vizaĝon manovrante ĝin kaj manipulantante tiel, ke la rigardo de la imperiestro, eĉ senkonscie kaj malgraŭvole, registru, registru kaj registru. Poste li estos atendanta, ĝis venos tiu ĉi tempo, ke la imperiestro ekpensu: momenton, ho, jes, la vizaĝo konata, sed ties nomon mi ne konas. Kaj, ni diru, li demandos pri la nomo. Nur pri la nomo, sed tio sufiĉos! Nun la vizaĝo kaj la nomo kuniĝos kaj ekestos la persono, kandidato por tuja avanco. Ĉar la vizaĝo — estas sennoma, kaj la nomo — abstrakta, kaj oni devas materialigi sin kaj konkretigi, ekhavi formon kaj aspekton, sin apartigi. Ho, estis la plej revata sorto, sed ankaŭ malfacile plenumbla. Ĉar sur la korto, kie la ĉirkaŭantoj salutis nian imperiestron, estis dekoj — kaj mi ne troigos — centoj da vizaĝoj pretaj konigi sin, unu vizaĝo kunpuŝiĝis kun alia vizaĝo, tiuj pli alte premegis tiujn malpli alte, la nigraj kovris la blankajn, unu vizaĝo malestimis alian vizaĝon, la maljunaj elŝovis sin antaŭ la junajn, la malfortaj cedis al la fortaj, unu vizaĝo malamamis alian vizaĝon, la malnoblaj premiĝis al la noblaj, la agresemaj al la hezitemaj, unu vizaĝo frakasis alian vizaĝon, sed falintaj, forpuŝitaj, triarangaj kaj venkitaj, eĉ ili — kvankam obeante la distancon altruditan de la hierarkio — antaŭeniĝis, elmetante multloke, el post la unuarangaj kaj titolhavaj vizaĝoj, almenaŭ pece-ton, orelon aŭ iomete da tempio, vangon aŭ makzelon, nur ke ili troviĝu — se eble — plej proksime al la imperiestra

pupilo! Se nia bonvolema sinjoro volus nur kroĉi rigardon al la tuta sceno, kiu prezentiĝos antaŭ li tuj poste, kiam li forlasos la aŭtomobilon, li ekvidus, ke al li ruliĝas ne nur tiu humila, kaj samtempe ardanta magmo centbuŝa, sed ekster la centra grupo kun altaj titoloj, dekstre kaj maldekstre, antaŭe kaj malantaŭe, proksime kaj malproksime, en la fenestroj, ĉe la pordoj kaj sur la padoj — aregoj da lakeoj, kuiristoj, balaistoj, ĝardenistoj kaj policistoj ankaŭ elmetas siajn vizaĝojn, por ke ili estu kaptitaj de lia rigardo. Kaj nia sinjoro vidas tion. Ĉu nia sinjoro miregis? Mi dubas. Ankaŭ li iam estis parto de la centbuŝa magmo. Ĉu li ne devis elmeti la vizaĝon, por fariĝi tronheredonto apenaŭ dudekkvarjara? Kaj la konkurado estis terura! Amaso da spertaj moŝtuloj klopodis pri la krono. Tamen ili rapidis, unu saltis antaŭ la alian, ili atakis sin reciproke, tremegante, ili ne eltenis, ho, tuj sidiĝi sur la tronon! Nia plej ruza sinjoro kapablis atendi. Kaj estas la plej grava kapablo. Sen tiu kapablo de atendado, sen tiu pacienca, kaj eĉ humila konsento, ke la ŝanco aperos nur post jaroj, neniam fariĝos politikisto. Nia respektinda sinjoro atendis dek jarojn, por montri sin inda je la tronheredo, kaj poste dekkvar jarojn, por esti nomumita kiel imperiestro. Entute — preskaŭ kvaronjarcento da singardaj, tamen energiaj klopodoj pri la krono. Mi diras — singardaj, ĉar nian sinjoron distingis — malfidemo, diskreteco kaj silento. Li konis la palacon, li sciis, ke ĉiu muro havas orelojn, ke el malantaŭ la kurtenoj atente observas lin ĉies okuloj. Do, li devis estis sagaca kaj ruza. Antaŭ ĉio li ne povis malkaŝi siajn intencojn trofrue, montri sin avida pri la regado, ĉar tio unuigas la konkurantojn kaj tuj levas



al batalo. Ili atakos kaj mortigos tiun, kiu elglitis antaŭen. Ne, dum jaroj oni devas marŝi samvice gardante, ke neniu antaŭeniĝu, kaj atendi ĝustan momenton. En la trideka vivojaro tiu ludo havigis al nia sinjoro la kronon, kiun li portados dum la sekvaj kvardek kvar jaroj.

[...]

Okaze de la renkontiĝo de ĉiuj prezidentoj la imperiestro aranĝis imponan bankedon. Al tiu bankedo la specialaj aviadiloj transportis de Eŭropo vinojn kaj kaviaron. Kontraŭ 25.000 dolaroj oni venigis el Holivudo Mirjam Makeban, por ke antaŭ la fino de la festeno ŝi kantu al la prezidentoj kantojn de zuluoj. Oni invitis preskaŭ tri mil personojn, dividitajn laŭ hierarkio en la superajn kaj malsuperajn kategoriojn, ĉiujn ĉi kategoriojn distingis alia koloro de la invitilo kaj alia menuo.

La bankedo okazis en la malnova palaco de la imperiestro. La gastoj venis inter longaj vicoj da imperiestra gvardio kun sabroj kaj halebaroj. La muzikisto trumpetis la imperiestran signalon sur la pinto de la turoj, en lumo de reflektoroj. El la galerioj la aktortrupoj prezentis historiajn scenojn pri la vivo de la mortintaj imperiestroj. El la balkonoj la knabinoj en popolkostumoj ŝutis florojn sur la kapojn de la gastoj. En la ĉielo eksplodis tufoj da fajraĵoj.

Kiam en la Granda Salono la gastoj sidis ĉe la tabloj, aŭdiĝis fanfaroj kaj eniris la imperiestro kun Naser ĉe la dekstra flanko. Ili formis la eksterordinaran duopon: Naser — alta, fortika, regema viro, kun la kapo elŝovita antaŭen, kun rideto kroĉita al siaj larĝaj makzeloj, kaj apude la malgranda, eĉ malfortika kaj de jaroj ŝanceliĝanta figuro de Hajle Selasje, lia

magra, esprimoplena vizaĝo kun la grandaj, brilantaj, penetremaj okuloj. Post ili paŝis duope la ceteraj ŝtatestroj. Ĉiuj en la salono ekstaris, aplaudis. Fariĝis tondra ovacio por la unueco kaj imperiestro. Poste komenciĝis la festeno. Unu nigrahaŭta kelnero estis servanta al kvar gastoj (pro emocio kaj ekscito preskaŭ ĉio elfalis el iliaj manoj). La ujoj kaj iloj estis arĝentaj, en la malnova Harara stilo, sur la tabloj troviĝis kelkaj tunoj da multekostaj arĝentaĵoj el la antikva tempo. Luj enpoŝigis manĝilojn: unu prenis kuleron, la alia — forkon.

Montoj da viando kaj fruktoj, fiŝoj kaj fromaĝoj levigis sur la tabloj. La multetaĝaj tortoj estis ŝmiritaj per dolĉa kaj bunta sukero. Ĉiuj luksaj vinoj dissemis koloran brilon kaj refreŝigan aromon. La orkestro muzikis, kaj la klaŭnoj en pimpaj vestoj transkapiĝis por amuzi la gastojn. La tempo pasis kun interparoloj, rido kaj manĝado.

Estis tre agrable.

Dum la bankedo mi devus serĉi kvietan lokon, sed mi ne sciis, kie ĝi estas. Tra la flanko pordo mi eliris el la Granda Salono. Estis la malhela nokto, falis pluveto — maja, sed malvarma. De tiu pordo komenciĝis malkruta deklivo, kaj kelkdek metrojn sube mi ekvidis feble prilumitan barakon sen muroj. De la flanko pordo, tra kiu mi eliris, ĝis la barako staris vice la kelneroj kaj transdonis pladojn kun forĵetaĵoj de la bankeda tablo. Sur la pladoj, al la barako, migris torento da ostoj, fruktostumpoj, miksitaj saladoj, fiŝkapoj kaj viandpecoj. Mi iris al la barako, glitante sur koto kaj disĵetitaj manĝorestaĵoj.

Ĉe la barako mi rimarkis, ke la mallumo, kiu densiĝas tie, movas sin, ke en

# Kamizolo

(Kamizelka)

Estas la homoj, kiuj ŝatas kolekti aĵojn valorajn aŭ malpli valorajn, laŭ siaj eblecoj. Ankaŭ mi havas kolekton, sed modestan kiel kutime ĉe komenco. En ĝi troviĝas la dramo skribita de mi, dum la latinaj lecionoj, kiam mi estis gimnaziano. Estas en ĝi kelkaj sekaj floroj, kiujn oni devas anstataŭigi per freŝaj, estas... Ŝajnas, ke estas nenio pli krom tre malnova kamizolo. Jen ĝi. Ĝia antaŭa parto estas senkoloriĝinta, la malantaŭa eluzita. Sur la kamizolo estas multaj makuloj, mankas butonoj, troviĝas trueto bruligita certe per cigaredo. Tamen la plej interesaj estas ĝiaj

kuntiriloj. Tiu, kiu havas bukon estas mal-longigita kaj alkudrita ne fake, ne tajlore, la alia laŭ sia tuta longeco estas truita per la bukaj dentoj. Rigardante la kamizolon oni tuj divenas, ke ĝia posedanto en ĉiu tago maldikiĝadis ĝis la momento, kiam la kamizolo estis jam neuzebla, kaj necesa estis la vestaĵo el entombiga agentejo. Nun mi volonte donus al iu tiun ĉi vestaĵon, kiu iom ĝenas min. Ŝrankojn por kolektaĵoj mi ne havas kaj inter miaj vestoj mi ne volas teni la kamizolon de malsanulo. Estis iam la tempo, kiam mi aĉetis ĝin kontraŭ pli da mono ol ĝia valoro, kaj mi pagus iom pli,



tiu mallumo io dispuŝiĝas, murmuris kaj plaŭdas, spiras kaj ŝmacas. Mi ekpaŝis malantaŭ la barakon.

En la nigra nokto, koto kaj pluvo, staris densa amaso da nudpiedaj almuzuloj. Lavistoj en la barako ĵetis por ili manĝorestaĵon el pladoj. Mi rigardis homojn, kiuj manĝis fruktostumpojn, ostojn kaj fiŝkapojn persiste kaj vikle. En tiu festenado estis ia streĉa, preciza atento, krome biologio iomete senbrida kaj forgesanta sin, kaj ankaŭ malsato, kiun ili kontentigis kun ĝojo, timo kaj ekstazo.

De tempo al tempo la kelneroj atendis, tiam haltis ĉi torento da pladoj kaj por momento la popolamaso trankviliĝis, malstreĉis siajn muskolojn, kvazaŭ iu gvidanto vokus komandon, ke ili povas ripo-

zi. Ili viŝis la malsekajn vizaĝojn kaj glatigis siajn ĉifonvestojn buliĝintajn dum pluvo kaj pro malpureco. Tamen baldaŭ la pladoj torentis denove — ĉar ankaŭ supre estis okazanta vorado, langoklakado kaj ŝmacado — kaj la popolamaso devigis sin al la beninda kaj fervora peno de manĝado.

Mi estis pluvmalseka, do mi reiris en la Grandan Salonon, al la imperiestra bankedo. Mi rigardis arĝenton kaj oron, veluron kaj pur-puron, prezidenton Kasavu, mian najbaron Aje Mamlaje, mi respiris per la odoro de incensoj kaj rozoj, mi aŭskultis sugestan zulu-kanton de Mirjam Makeba, mi riverencis antaŭ la imperiestro (estis la ĉefa postulo de la etiketo) kaj revenis hejmen.

**el la pola tradukis Tomasz Chmielik**

se oni pli marĉandus. La homo havas en sia vivo momentojn, kiam li ŝatas havi ĉe si la objektojn, kiuj memorigas malĝojon. La malĝojoj ne estis mia, nur de miaj najbaroj. Tra mia fenestro mi povis en ĉiu tago observi ilian ĉambreton. En aprilo ili estis triope: la sinjoro, la sinjorino kaj malgranda servistino, dormanta malantaŭ la ŝranko sur kofreto. La ŝranko estis intense ĉerizkolora. En julio ili restis jam duope: la sinjorino kaj la sinjoro, ĉar la servistino foriris al la gemastroj, kiuj pagos al ŝi tri rublojn jare kaj kuiris en ĉiu tago tagmanĝon. En oktobro restis nur — la sinjorino. Ne tute sola, ĉar en la ĉambro troviĝis mebloj: du litoj, la tablo kaj la ŝranko. Komence de novembro oni vendis dum aŭkcio ĉiujn nebezonatajn objektojn kaj el memoraĵoj post sia edzo la sinjorino lasis nur ĉi kamizolon, kiun nun mi posedas. Ĉe la fino de novembro la sinjorino vokis al la malplena loĝejo stratan komerciston de malnovaĵoj, vendis al li sian ombrelon kaj la edzan kamizolon kontraŭ 40 groŝoj. Poste, ŝi fermis la loĝejon, malrapide trapasis la korton, ĉe la pordo redonis la ŝlosilon al la pordisto, rigardis dum momento sian iaman fenestron sur kiun falis neĝeretoj kaj malhaste perdiĝis malantaŭ la pordo. Sur la korto restis la strata komercisto. Li starigis kolumon de sia jako, sub la brakon metis la ĵus aĉetitan ombrelon kaj envolvante la manojn per la kamizolo li murmuris:

— Komerco, sinjoroj, komerco!

Mi vokis lin.

— Ĉu bonkora sinjor volas ion vendi? — li demandis enirante.

— Ne, mi volas aĉeti ion de vi.

— Certe estimata sinjor volas ombrelon — respondis la judo, ŝetis la kamizolon sur la plankon, forskuis neĝon de sia kolumo kaj komencis malfermi la ombrelon.

— *Fajn meblo* — li diris. — Por tja neĝo ĝi estas utila. Mi scias, ke vi, estimata sinjor povas havi silkan ombrelon, eĉ du, sed

ili estas bonaj nur somere!

— Kiom kostas la kamizolo? — mi demandis.

— Kju kamizol?... — li demandis mirigita, pensante certe pri la propra.

Tamen rapide li ekkomprenis kaj levis la kamizolon de sur la planko.

— Por tju ĉi kamizol?... Ĉu sinjoro demandas pri tju ĉi kamizol?

Poste li daŭrigis suspekteme:

— Por kio tja kamizol al estimata sinjor?!...

— Kiom da mono vi volas kontraŭ ĝi?

Liaj flavaj sklerotoj ekbrilis kaj la pinto de la nazo pli ruĝiĝis.

— Donu estimata sinjor rublon! — li respondis montrante la kamizolon tiel, por vidigi ĉiujn ĝiajn avantaĝojn.

— Mi pagos duonon de rublo.

— Duonon? Por tja vestaĵ? Tjo ne povas esti — diris la komercisto.

— Eĉ ne groŝon pli mi donos .

— Estimata sinjor, ne ŝercu!... — li diris frapante mian ŝultron. — Vi mem scias, kjom valora estas tja aĵo. Ĝi ne estas por malgranda infano, nur por maturaj personoj.

— Nu, se vi ne volas preni duonon de rublo, jam iru! Pli multe mi ne donos.

— Ne estu kolera sinjor! — li interrompis cedeme. — Vere mi ne povas vendi ĝin kontraŭ duono de rublo, je mia konscienco, sed mi akceptos vian decidon!... Diru mem, kjom ĝi estas valora kaj mi konsentos. Mi preferas malgajni, por ke vi estu kontenta.

— La kamizolo estas valora 50 groŝojn kaj mi donos al vi duonon de rublo.

— Ĉu duonon de rublo? Jam estu duono de rublo!... — li suspiris enpremanate la kamizolon en miajn manojn. — Estu mia perdo!... Mi ne diris tiujn vortojn mensoge el mia buŝ... tju vent!...

Kaj li montris la fenestron, malantaŭ kiun densiĝis neĝnuboj.

Kiam mi prenis monon el la poŝo, la komercisto ŝajne ion rememoris, kaptis la kamizolon kaj rapide metis fingrojn en ĝiajn poŝojn.

— Kion vi serĉas?

— Eble mi ion lasis en ĝi, mi ne memoras! — li respondis per la plej natura voĉo, kaj redonante al mi la aĉetaĵon li diris:

— Aldonu, estimata sinjor, dek groŝojn!

— Nu, adiaŭ!

— Mi falas al viaj piedoj, sinjoro. Hejme mi ankoraŭ havas tre bonan pelton...

Ankoraŭ de malantaŭ la pordo elŝovinte la kapon li demandis:

— Ĉu eble estimata sinjor ordonos alporti ŝafinajn fromaĝojn?...

Post kelkaj minutoj li vokis sur la korto: „Komerco! komerco!...” Kaj kiam mi ekstaris ĉe la fenestro, li klinis sin kun amika rideto.

Komencis neĝi tiel dense, ke eĉ malheligiĝis. Mi metis la kamizolon sur la tablon kaj komencis pensi jen pri tiu sinjorino, kiu foriris ien tra la pordego, jen pri la malplena loĝejo de miaj najbaroj, jen pri la posedinto de la kamizolo, super kiu kreskas pli kaj pli dika neĝotavolo.

Apenaŭ tri monatojn pli frue mi aŭdis, kiel dum bela septembra tago ili interparolis. En majo la sinjorino eĉ kantetis foje melodion kaj la sinjoro ridis legante en la gazeto *Festa Kuriero*, kaj hodiaŭ...

En nia domo ili ekloĝis komence de aprilo. Ili vekigiadis frue matene, trinkis teon el lada samovaro kaj kune foriradis; ŝi por instrui, li — al sia oficejo.

Li estis malgrava oficisto, kiu rigardis siajn estrojn kun tia admiro, kiel turista rigardas Tatrajn montojn. Li devis multe labori dum la tuta tago. Mi vidis lin eĉ nokto-meze, ĉe lampo, klinitan super la tableto.

Kutime la edzino sidis apude kaj kudris. Ofte rigardante lin, ŝi ĉesis kudri kaj admonis lin:

— Nu, jam sufiĉas, enlitiĝu!

— Kaj vi, kiam vi enlitiĝos?...

— Mi nur finos kelkajn stebojn.

— Nu... ankaŭ mi skribos kelkajn frazojn.

Ili ambaŭ klinis la kapojn kaj plu laboris; kaj denove post iom da tempo la sinjorino diris:

— Enlitiĝu!... enlitiĝu!

Ofte respondis al ŝi mia horloĝo sonigante la unuan horon.

Ili estis la homoj junaj, nek belaj, nek malbelaj, trankvilaj. Se mi memoras bone, la sinjorino estis malpli dika ol la edzo, kies staturo estis fortika. Mi dirus, ke eĉ tro dika por tia modesta oficisto.

Ĉiun dimanĉon, en tagmezo, brak-ĉe-brake ili foriradis promene kaj revenadis malfrue vespere. Certe ili manĝis en la urbo. Iam mi renkontis ilin ĉe la pordego inter la Botanika Ĝardeno kaj la parko de Lazienki. Ili aĉetis du glasojn da bonega akvo kaj du grandajn mielkukojn kaj havis la kvietajn mienojn de urbanoj, kutime manĝantaj ĉe teo varmegan ŝinkon kun kreno.

Ĝenerale malriĉaj homoj ne bezonas multe por trovi animan ekvilibron. Iom da manĝaĵo, multe da laboro kaj multe da sano sufiĉas al ili. Ĉio krome aperos el si mem.

Al miaj najbaroj — kiel ŝajnas — ne mankis manĝaĵo kaj almenaŭ laboro. Tamen la sano ne ĉiam estis.

En julio la sinjoro malvarmumis, cetere ne tro forte. Sed li havis abundan sangelfluon pro kiu li svenis.

Jam estis nokto. La edzino — kovrinte lin en la lito — vokis la edzinon de la pordisto kaj mem kuris por venigi kuraciston. Ŝi demandis pri kvin kuracistoj, sed trovis nur unu hazarde sur la strato. Kiam la kuracisto ekvidis ŝin ĉe la flagranta laternolumo konstatis, ke antaŭ ĉio oni devas trankviligi ŝin. Ĉar kelkfoje ŝi ŝanceliĝis, certe pro lacego, kaj sur la strato ne estis droŝko, la kuracisto donis al ŝi la brakon kaj irante klarigis, ke sangelfluo povas nenion signifi.

— Sangelfluo povas esti el laringo, stomako, nazo, malofte el pulmoj. Cetere, se la homo ĉiam estis sana, tuisis neniam...

— Nur malofte — la sinjorino flustris, haltante por respri.

— Ĉu malofte? Tio ne gravas. Eble li havas malfortan bronkiton.

— Jes... tio estas bronkito — ripetis la sinjorino jam laŭte.

— Ĉu pulmiton li havis iam?

— Jes... — ŝi respondis, haltante denove.

— Nu... certe antaŭ longa tempo? — daŭrigis la kuracisto.

— Ho... jes... antaŭ tre longa tempo...

— Ŝi diris haste. — En la pasinta vintro.

— Antaŭ unu kaj duona jaro.

— Ne... antaŭ la komenco de la nuna jaro. Jam antaŭ longa tempo.

— Ho!... kia mallumo sur la strato kaj la ĉielo estas kovrita per nuboj — diris la kuracisto.

Ili eniris la domon. La sinjorino demandis time la pordiston, ĉu okazis io? — kaj ŝi eksciis, ke nenio. En la loĝejo ankaŭ la pordistino diris, ke nenio okazis, kaj la malsanulo dormetas.

La kuracisto vekis lin per malforta skuo, esploris kaj ankaŭ diris, ke estas nenio.

— Mi tuj diris, ke estas nenio! — ekparolis la malsanulo.

— Nenio!... — ripetis la sinjorino premante al li la ŝvitmalsekajn manojn. — Mi ja scias, ke sangelfluo povas esti el stomako aŭ el nazo. Ĉe vi certe ĝi estis el la nazo... Vi fariĝis dika kaj bezonas moviĝi, sed vi nur sidas... Ĉu vere, sinjoro doktoro, ke li bezonas moviĝi?

— Jes! jes... Moviĝado estas ĉiam bezonata, sed via edzo devas kuŝi kelkajn tagojn. Ĉu li povas forveturi al vilaĝo?

— Li ne povas... — malgaje flustris la sinjorino.

— Nu... tio ne gravas! Do, li restu en Varsovio. Mi vizitados lin kaj dume... li

iom kuŝu kaj ripozu! Kaj se la sangelfluo ripetigus... — diris la kuracisto.

— Kion fari? — demandis la edzino pala kiel vakso.

— Nu, nenion. Via edzo iom ripozu, tie cikatriĝos...

— Tie... en la nazo? — demandis la sinjorino tordante la manojn antaŭ la kuracisto.

— Jes... en la nazo. Komprenoble! Trankviliĝu, sinjorino, kaj fidu al Dia protekto. Bonan nokton!

La vortoj de la kuracisto kvietigis la sinjorinon tiel, ke post la timego, kian ŝi sentis de kelkaj horoj, ŝi fariĝis preskaŭ ĝoja.

— Nu, estas nenio grava! — ŝi diris iom ridetante kaj iom plorante. Ŝi ekgenuis ĉe la lito de la edzo kaj komencis kisi liajn manojn.

— Ne tiel grava estas la malsano — li ripetis mallaŭte kaj ridetis. — Kiom da sango elfluas el homo dum milita batalo kaj tamen li estas sana poste.

— Jam neniom parolu! — la edzino petis lin.

Ekstere tagiĝis. En somero — kiel oni scias — la noktoj estas tre mallongaj.

La malsano daŭris multe pli longe ol ili pensis. La edzo ne plu venadis al sia oficejo, kio ĉagrenis lin pli malmulte, ĉar kiel dungita oficisto li ne bezonis libertempon kaj povas labori tiam, kiam li volus kaj se li trovus liberan lokon. Restadante en la hejmo li estis pli kaj pli sana. Do, la edzino prenis ankoraŭ kelkajn lecionojn da horoj semajne kaj tiel elturniĝis el pagoj.

Kutime ŝi foriradis je la oka matene en la urbon. Ĉirkaŭ la dektria ŝi revenadis hejmen por kelkaj horoj, kuiris tagmanĝon al la edzo kaj denove forkuradis por iom labori.

La vesperojn ili pasigadis kune. La sinjorino, por ne mallabori, alportadis iom pli multe da vestaĵoj por kudri hejme.

lun fojon, en la fino de aŭgusto ŝi renkontis sur la strato la kuraciston. Longe ili iris kune. Ŝi kaptis subite lian manon kaj

petegis:

— Venu al ni, sinjoro! Eble Dio helpos!...  
Tiel li trankviliĝas post ĉiu via vizito.

La kuracisto promesis, kaj la sinjorino reheimiĝis kun tia vizaĝo, kvazaŭ ŝi estus plorinta.

Pro senlaboreco la edzo fariĝis ial kolerema kaj malesperanta. Li riproĉadis al la edzino, ke tro multe ŝi zorgas pri li, sed li certe mortos, kaj finfine li demandis:

— Ĉu la kuracisto diris al vi, ke mi ne vivos eĉ kelkajn monatojn?

La sinjorino rigidiĝis.

— Kion vi parolas? — ŝi diris. — De kie vivis tiuj pensoj?

La malsanulo ekkoleris.

— Nu, venu al mi... tien ĉi!... — li diris impete, kaptante ŝiajn manojn. — Rigardu en miajn okulojn kaj respondu: ĉu la doktoro diris tion al vi?

Kaj li kroĉis al ŝi febre brilan rigardon. Ŝajnis, ke pro ĉi tiu rigardo eĉ muro flustrus sekreton, se ĝi kaŝus ion.

Sur la virina vizaĝo aperis stranga trankvilo. Ŝi ridetis milde eltenante lian sovaĝan rigardon. Nur ŝiaj okuloj fariĝis kvazaŭ vitrecaj.

— La doktoro diris — ŝi respondis — ke estas nenio grava, vi devas nur iom ripozi...

La edzo subite ellasis ŝin, li ekstremegis, ridis kaj diris svingante la manon:

— Nu vidu, kiom ekscitiĝema mi estas! Mi pensis, ke la doktoro perdis ĉian esperon pri mi... sed... vi konvinkis min... Mi jam trankviliĝis!

Pli kaj pli gaje li ridis pri siaj suspektoj.

Cetere tia atako de suspektemo neniam plu ripetiĝis. La milda kvieto de la edzino ja estis plej bona pruvo, ke lia sano ne estas malbona.

Ĉar kial ĝi estu malbona?

Estis tuso, sed... nur pro bronkito. Kelkfoje, pro longa sidado, fluetis sango... el lia nazo. Li estis kvazaŭ febranta, sed tio

ne estis febro, kaj nur ia nervozeco.

Verdire li sentis sin pli kaj pli sana. Li ekhavis nevenkeblan deziron pri malproksimaj ekskursoj, sed... ial mankis al li forto. Venis eĉ tagoj, kiam la edzo ne volis kuŝi en la lito, sed li nur sidis vestita sur la seĝo, preta foriri, nur ke forlasu lin tiu momenta senforteco.

Maltrankviligis lin nur unu detalo.

lun tagon, surmetante la kamizolon, li ekvidis, ke ĝi estas tro vasta.

— Ĉu tiom mi maldikiĝis?... — li flustris.

— Kompreneble, ke vi devis maldikiĝi iom — respondis la edzino. — Sed vi ne povas troigi...

La edzo atente rigardis ŝin, kaj ŝi eĉ ne dekroĉis la okulojn de kudraĵo. Ne, ŝia trankvilo ne povas esti ŝajnigita!... La edzino scias de la doktoro, ke li ne estas tiel malsana, do li ne devus ĉagreniĝi.

Komence de septembro la atakoj de nervozeco, simila al febro, estis pli kaj pli fortaj, preskaŭ dum la tutaj tagoj.

— Stultaĵo! — parolis la malsanulo. — Inter somero kaj aŭtuno eĉ al la plej sana homo okazas ia ekscitiĝemo, ĉiu fartas malbone... Nur tio mirigas min, kial mia kamizolo estas pli kaj pli vasta?... Mi maldikiĝis terure kaj certe mi ne povos esti sana ĝis tiam, kiam mi ne havos la antaŭan korpepon.

La edzino aŭskultis kun atento kaj devis rekoni, ke ŝia edzo pravas.

Ĉiutage la malsanulo ellitiĝis kaj vestis sin, kvankam sen helpo de la edzino li povis surmeti neniun vestaĵon. Ŝi almenaŭ devigis lin al tio, li ne portadu surtuton, kaj nur palton.

— Kial ne miri — li parolis ofte, rigardante sin en la spegulo — kial ne miri, ke mi estas senforta. Ho, kian aspekton mi havas!

— Nu, la vizaĝo ĉiam ŝanĝiĝas facile — interrompis la edzino.

— Jes, tio estas vero, sed mi maldikiĝas

en la tuta korpo.

— Ĉu tiel ŝajnas al vi? — la sinjorino demandis kun granda dubo.

Li enpenŝiĝis.

— Ha! eble vi pravas... Ĉar eĉ... de kelkaj tagoj mi vidas, ke... mia kamizolo...

Jam ĉesu! — interrompis la sinjorino — vi ja ne dikiĝis...

— Kiu scias?... ĉar observante laŭ la kamizolo...

— Do, vi devus refortiĝi.

Ho! Vi dezirus tuj... Unue mi devas iom dikiĝi. Mi eĉ diros al vi, ke kiam mi havos la antaŭan korpepezon, mi ankoraŭ ne refortiĝos plene... Kion vi faras malantaŭ la ŝranko? — li demandis subite.

— Nenion. Mi serĉas en la kofro viŝtukon, sed mi ne scias... ĉu ĝi estas pura.

— Ne penigu vin tiel, ĉar eĉ via voĉo ŝanĝiĝas... La kofro ja estas peza.

Vere, ĝi devis esti peza, ĉar la vizaĝo de la edzino ruĝiĝis, sed ŝi estis trankvila.

De tiam la malsanulo pli atente observis sian kamizolon. Ĉiujn kelkajn tagojn li vokis la edzinon kaj parolis:

— Nu... rigardu! Konvinkiĝu mem: hieraŭ mi ankoraŭ povis enŝovi fingron ĉi tien... Kaj hodiaŭ mi jam ne povas. Vere mi pli dikiĝas!...

Iun tagon la ĝojo de la malsanulo ne havis limojn. Kiam la edzino rehejmiĝis post leciono, li salutis ŝin kun brilantaj okuloj kaj diris tre kortuŝita:

— Aŭskultu! Mi diros al vi sekreton... Vidu, mi iom trompis vin pri la kamizolo. Por trankviligi vin, ĉiutage mi mem kuntiris la zonon kaj tial la kamizolo estis malvasta... Laŭ tiu maniero mi kuntiris la zonon ĝis fino. Mi jam ĉagreniĝis pensante, ke la sekreto malkaŝiĝos, sed hodiaŭ, subite... Ĉu vi scias, kion mi diros al vi?... Hodiaŭ, mi faras la plej sanktan ĵuron, anstataŭ kuntiri la zonon, mi devis ĝin malstreĉi!... Por mi vere estis malvaste, kvankam ankoraŭ en

la pasinta tago la zoneto kuŝis iom pli vaste... Nu, ankaŭ mi kredas, ke mi estos sana... Mi !... La doktoro pensu, kion li volas!

La longa parolo elĉerpis lin tiel, ke li devis iri al la lito. Sed kiel la homo, kiu sen kuntirado de la zono dikiĝas, li ne kuŝiĝis, kaj nur sidigis kvazaŭ sur fotelo, apogante sin ĉirkaŭbrakita al la edzino.

— Nu, nu!... — li flustris — ĉu mi povus tion esperi?... Du semajnojn mi trompis mian edzinon pri la la malvasta kamizolo, kaj hodiaŭ ĝi vere estas tia!...

— Nu... nu!

Dum la tuta vespero ili sidis alpremighante unu al la alia.

La malsanulo estis kortuŝita kiel neniam antaŭe...

— Ho, mia Dio! — li flustris kisante la manojn de la edzino — mi pensis, ke mi maldikiĝos ĝis... la vivofino. De du monatoj, nur hodiaŭ, unuafoje mi ekkredis tion, ke mi povas esti sana.

Al malsanulo ĉiuj mensogas, kaj plej multe lia edzino. Sed kamizolo — ĝi mensogos neniam!...

Hodiaŭ rigardante la malnovan kamizolon, mi vidas, ke pri ĝiaj kuntiriloj laboris du personoj. La sinjoro — ĉiutage traŝovadis la bukon por trankviligi sian edzinon, kaj la sinjorino mallongigadis la zonon, por esperigi sian edzon.

„Ĉu iam ambaŭ renkontiĝos por konfesi unu al la alia la tutan sekreton pri la kamizolo?...” — mi pensis rigardante en la ĉielon.

La ĉielo preskaŭ ne vidiĝis super la tero. Falis nur la neĝo tiel densa kaj malvarma, ke eĉ en la tomboj frostiĝis homaj ostoj.

Kiu tamen diros, ke malantaŭ ĉi tiuj nuboj ne estas la suno?

**el la pola tradukis  
Danuta Kowalska**



## Portreto de la virino

La virino... la unua estis Eva, poste sekvis aliaj kaj tiel okazas ĝis la nuna tempo kaj daŭros ankaŭ post ni. Sed ŝi ankaŭ ŝanĝiĝas dum jarmiloj kaj jarcentoj, precipe en la animo, menso kaj vivmaniero. Dio kreis Evan el Adamo. Ĉu ŝi, kiel deveninta el la parto de lia korpo, devas ĉiam sekvi lin? Ne, ŝi evoluas, ekestas libere, ŝi ne volas dependi de viro, sed sekvi liajn vivcelojn kaj atingojn kaj serĉi ankaŭ novajn, proprajn vojojn. Por atingi neakireblan ekzemplon — vivmanieron de viro postkuras lin, ekstreme elĉerpigante siajn fortojn.

Ĉu ĉi tio stas jam fino de virinaj metamorfozoj? Kion reale deziras la virino kaj kien celas? Tion scias neniu eble eĉ la virino mem.

Pli facile respondi, kia estis la virino en la pasinteco, ĉar la riĉa monda literaturo donas al ni virinajn portretojn el diversaj epokoj. La virino estis ĉiam la plej ŝatata temo de poemoj, kantoj, teatraĵoj kaj romanoj. Tamen la literatura portreto de la virino ŝanĝiĝas kaj evoluas same kiel la virino mem.

En la frua mezepoko la virino aperas pli ĝuste kiel damo de kavalira koro kaj objekto de lia adoro, pli kiel bela floro ol vera homo. Sen la virino ne povus ekzisti “la kavalira rito” — la ĉefa vivmaniero de tiu tempo; por ŝi oni vivis, batalis, mortigis sin en dueloj.

En la renesanca literaturo oni trovas novajn modelojn kaj novajn virinajn portretojn. Ĉu la virino ŝanĝiĝas, ĉu naskiĝis

nova rigardo de la viro al ŝi, ĉu ŝanĝiĝas ili ambaŭ? Ĉar elpaŝas jam virino kiel homo, patrino, partnero de la viro en la vivo. Ŝi sentas, amas, suferas, sopiras. Sed tio ĉi estas la avanco de la virino nur en la literaturo. Danke al tio la virinaj portretoj aperas jam pli riĉaj. Oni ekvidas diversajn subtilaĵojn de la virina animo kaj diversmanierajn reagojn al sukcesoj aŭ malbonsorto. Tiamaniere la virina temo en la literaturo ekstaras pli komplikitaj kaj rafinita.

En la pli posta literaturo denove oni trovas aliajn virinajn portretojn. La virino, krome ĝisnunaj trajtoj kaj ecoj aperas ne nur kiel patrino kaj partnero de la viro, sed ŝi trovas novan lokon en la socio. Ŝi montriĝas kiel bona socio kaj patrioto. Ŝi havas malfermitajn okulojn al ĉio, kio okazas en ŝia lando kaj en la mondo. Ŝi estas scivola, aktiva, eĉ heroa, kiel Joanna d’Arc aŭ Emilia Plater. Sed ŝi ankoraŭ ne deziras egaligi al viro kaj tion oni ne postulas de ŝi. Oni kritikis ŝin forte, se ŝi ne estas ideala homo, patrino, edzino kaj socio.

En la literaturo de la romantika periodo la virino pli ofte aperas ne nur kiel anĝelo sed ankaŭ kiel fatala forto, kiu povas detrui, neniiĝi la viron kaj liajn talentojn. Oni admiras grandan potencon de la virina psiko, eĉ timas ĝin. La portreto de la virino estas riĉa en sia animdiverseco kaj en nekomprenataj de viroj strangaĵoj. Ŝi estas bela kaj bona, sed povas esti perfida, agresema, konkere-

ma, iom liberema; sed materiale dependas de la viro. Ŝi ne batalas ankoraŭ por emancipacio, por sociala avanco kaj profesia laboro.

Pli poste en la pozitivismaj literaturo la virino batalas por moralaj rajtoj kaj novaj vivkutimoj. Baldaŭ sekvas socia avanco de la virino, kiu luktas por sia klereco kaj por rajto pri profesia laboro. La virino jam ĉesas timi profesion laboron, traktante ĝin ŝanco en la vivo por sia propra vojo. Ŝi deziras plenan liberigon socian kaj materialan. Ŝi jam havas konscion de sia propra situacio en la socio kaj kontraŭstaras tradician modelon de la vivo. Aperas famaj sciencistinoj, kiel Maria Curie-Skłodowska, famaj virinoj verkistoj, inĝenieroj, kuracistoj, instruistoj, artistoj ktp, bravaj militeroj-komandantoj, partizanoj kaj politikaj malliberuloj.

La emancipacio donis novajn rajtojn kaj devojn al la virino, kiuj certe pliriĉigis ŝian vivon — sed.. ĉu ankaŭ donis egalecon? Ne estas facila vivo, kiam oni gajnis multajn novajn rajtojn kaj devojn. Sed ĉu ne tro de la devoj? Ŝi devas esti patrino, naski infanojn, poste zorgi iliajn sanon, kreskadon, edukadon, esti bona spirito de la hejmo, indulgema edzino por ofte laca edzo; lia partnero en la vivo, en profesia laboro aŭ sciencista kariero. Sed kion fari? La nuna virino preskaŭ de la infanaĝo revas ne nur pri la hejma vivo, pri la plej superbaj infanoj kaj la escepte ideala edzo. Tio ĉi jam ne sufiĉas; ŝi pensas, serĉas, deziras ĉiam pli multe agi, sukcesu kiel la viro — eĉ pli. Kaj ofte ŝi sukcesas, ĉar ŝi estas plena da pacienco, sistemo kaj sindono al la afero, kiun ŝi akceptis kiel sian taskon.

Kia estas la virino de mia portreto?

Ŝi elektis la idealan, amatan edzon,

naskis fileton kaj edukante lin, gardante la hejmon, ŝi mem studis ĉe universitato. Sukcesis bonegan sciencon diplomon. Komencis sukcese labori sed.. alvenas nova, ankaŭ priverita kaj senpacience atendata infaneto. Tio ne estas tro por ŝiaj fortoj, por ŝiaj fervoro kaj sindono al la familio kaj la scienco. Ĉio estas feliĉe, sed.. o Dio!!! La kara priverita infaneto ne aŭdas sian voĉon, nek ies ajn en la hejmo! Kion fari?! La virina koro ploras, suferas, plendas. Ĉu tio helpas? Virino, amikino mia!!! Ĉesu malesperi, komencu trovi konsilon en sia propra menso, animo kaj koro. La sorto decidis pri la aŭdo-difekto de via eta fileto, sed vi devas mem decidi pri la vojo, pri la vivo de tiu ĉi infaneto. Li rajtas esti feliĉa kaj utila por aliaj kiel ĉiuj homoj. Nur en viaj manoj troviĝas la estonteco de via senforta, sendecida, plenfida, al vi ride-tanta knabeto. Se la kuracisto ne povas helpi, vi mem devas helpi. Nun tio ĉi estas por vi la plej grava tasko de via vivo. La sorto sangis viajn sciencajn revojn kaj pretendas de vi alian kreadon.. la kreadon de feliĉo, malgrau ĉio! Tio postulas novan, alian talenton de vi. Via kapablo kaj la virina intuicio, kun ĝisnuna fervoro, devas sekvi novan problemon, ekde nun la plej gravan por vi. Vi devas esti saĝa, kiel sciencisto, energia kiel viro, originala en sia eduklaboro kiel inventisto. Vi devas trankvile eltrovi ĉiutage ŝlosilon al la menso, al la koro de via infaneto. Vi devas ĉiutage eltrovi sian propran edukmetodon.

Kaj la virino kun fervoro studas librojn de la speciala pedagogio kaj logopedio. Ŝi serĉas la solvon de la problemo en siaj koro, menso kaj intuicio. Neniu ekkredus — danke al la persistema laboro kaj sin-

dono — ebla nur por la virino — la infano komencas paroli. Dank al ŝiaj propraj didaktikaĵoj kaj belege ilustritaj libretoj, kiuj frapante la infanan menson incitas ĝin kaj kreas grandan imagokapablon kaj fantazion, li komencas koni la mondon. Danke al ŝia virina aranĝemo kaj inventa spirito la infano ĉiutage fariĝas pli kaj pli scivola, amas diverskolorajn libretojn, vivajn florojn kaj bestetojn lin ĉirkaŭantajn. Tio instruas lin pri ĝojo de la vivo, kiu devenas el beleco de la naturo. Por manifesti sian ĝojon la infaneto devas tion eldiri kaj tiumaniere li lernas paroli kaj kun ĉiutaga fervoro.

Neniu ekkredus, la knabo estas jam en normala lernejo por bone aŭdantaj infanoj kaj ĝojas kun ili pro beleco de' l mondo. Ne gravas malfacilaĵoj, sed gravas sukcesoj, kiuj sekvas kiel rezultoj de lia grandega laboro. Ne gravas korpaj difektoj, sed precipe animaj kaj mensaj ecoj, kiuj pliriĉigas la homan vivon kaj faras ĝin valora, interesa kaj utila.

Ĉu vi scias, la junulo nun finis mezlernejon, partoprenis sukcese la landan biologian olimpiadon. Li konas kelkajn fremdajn lingvojn, ankaŭ Esperanton. Li fariĝis studento kaj certe poste ekestos sciencisto, ĉar la pordoj al ĉiuj biologiaj sciencoj malfermiĝos al li.

Daŭru, junulo, sekvu vian vivcelon kaj ĝoju ankaŭ per la ĝojo de la trankvila, kvankvam iom laca, vizaĝo de via patri-no! Ŝi estis la unua virina inspiro en via vivo por venki korpajn mankojn.

La mondo estas vere bela por ĉiuj, la naturo riĉa kaj feliĉiganta ĉiujn, kaj la virino danke al siaj sento, sindono kaj amo — kiel la bona spirito, povas servi kiel la helpanto de Dia Amo.

Al Dio estu danko!



## Bertrand Russel (1872–1970)

### Dekalogo de liberalulo

1. Pri nenio estu certa en cent procentoj.
2. Ne imagu, ke donos profitojn kaŝo de faktoj, iutage certe ili malkaŝos sin.
3. Neniame provu malvolontigi kunestulojn pensadi, ĉar certe tio al vi malsukcesos.
4. Kiam vi renkontos kontraŭon, se eĉ flanke de edz(in)o aŭ infanoj, vi klopodu persvadi ilin por viaj propraj konvinkoj helpe de argumentoj kaj ne de aŭtoritato, ĉar la venko apogita je aŭtoritato estas malvera kaj trompa.
5. Ne emociiĝu lige kun aŭtoritatoj. Ĉiam aperos aŭtoritatoj proklamantaj ion kontraŭan.
6. Ne klopodu subpremi perforte nocivajn opiniojn, ĉar se tion faros vi, tiuj opinioj subpremos vin.
7. Ne timu eldiri ekscentrajn opiniojn, ĉiu agnoskata hodiaŭ opinio estis iam la ekscentrita.
8. Trovu pligrandan inklinon al inteligenta disputo ol al la pasiva konsento, se do vi aprezas inteligentecon bona, la disputo povas garantii pli profundan interkonsenton ol la pasiva jesado.
9. Estu ĉiam fidela al vero, eĉ tiam, kiam estas ĝi por vi maloportuna, ĉar ĝi estiĝas ankoraŭ pli maloportuna kiam vi provos ĝin kaŝigi.
10. Ne envidu feliĉon al loĝantoj de paradizo de stultuloj, ĉar nur stultulo povas ion tion konsideri feliĉo.

**„Polityka” nro 37/2001**  
**Esperantigis: Stanisław Śmigielski**

Kara Kazimierz!

Urszula Kwaśniewska (polino, nun loĝanta en Svedio) antaŭ nelonge sukcese finis sub mia gvido Internacian Perfektigan Korespondan Kurson per mia libro „Vojaĝo en Esperanto-lando” (ĵus anoncita kiel la plej vendita Esperanta libro por la kvina sinsekva jaro en la Esperanta Vikipedio).

Ŝi verkis recenzon pri „Vojaĝo”. Laŭ konsilo de Osmo Buller, mi rekomendas tiun recenzon por publikigo en „Pola Esperantisto”. Per tio ni plikonigos tiun popularan libron en Pollando.

**Kun koraj bondeziroj,  
Boris Kolker**

## **MIA VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO**

Kiel nova esperantisto, oni studas la lingvon, memorfiksas vortojn, sufiksojn, korelativojn, batalas kun akuzativo kaj provas konstrui kompreneblajn frazojn.

Baldaŭ aperas nocioj kiel Zamenhof, movado, agado, UEA, kongresoj, internaciaj ekzamenoj, originala literaturo, interna ideo. Aperas novaj nomoj, kiuj ŝajnas tre konataj por aliaj personoj, sed ofte malfacile troveblaj en naciaj enciklopedioj: Piron, Privat, Valano, Eroŝenko, Auld, Corsetti, Lapenna...

Post iom da tempo aperas scivolemo, bezono legi ion pli bonan, veran literaturon — ne nur lernolibrojn, kaj diskuti pri ĝi; legi bonan poezion kaj kompreni ĝiajn sencon kaj profundon; kaj fine — bezono lerni verkadon de bonaj eseoj, artikoloj, rakontoj. Sed kie estas tiu instruisto, kie estas tiu lernejo, kie estas lernolibro por lerni ĉion ĉi?

Ĉio ekzistas! La lernejo estas Internacia Perfektiga Koresponda Kurso en Interreto, la instruisto-akademiano Boris Kolker, kaj lernolibro — la tria eldono de la plej aĉetata libro „Vojaĝo en Esperanto-land-

do”. La libro ne estas dika, nur 280-paĝa. Sed kiom da informoj, kiom da ekzercoj, kiom da legado, kiom da verkado! Nur 26 lecionoj, ne pli, sed bezonata estis por mi pli ol unu jaro por tralegi kaj trastudi ilin.

La libro enhavas informojn pri la vivo de Zamenhof, biografiojn de konataj esperantistoj - kaj verkistoj, kaj elstaraj movadanoj. Do tiuj personoj iom post iom proksimiĝas al ni, al nia konscio. Tiuj famaj gravuloj, kies diversspeca agado estas rimarkinda kaj memorinda, fariĝas niaj amikoj.

En la libro troviĝas bonega elekto de literaturo-noveloj kaj poeziaĵoj, fragmentoj de romanoj. Eĉ la personoj, kiuj neniam legas poezion, fariĝas ĝiaj ŝatantoj. Ĉiu teksto estas kiel perlo.

Ĉiu ĉapitro enhavas komenton kun klarigo de malfacilaj vortoj, mallongaj biografioj kaj aliaj koncizaj kaj gravaj informoj. Ĉiu leciono finiĝas per Lingva praktiko kun ekzercoj de krea karaktero: interpretado de tekstoj, eseoj por verkado, vortludoj kaj kvizoj pri Esperantaj temoj.

Sed la plej grava kaj valora estas la gvido. Sen la instruisto tiu libro estus nur duone bona. Humoro, pacienco, toleremo kaj helpemaj rimarkoj de Boris estas necesaj por evoluo de lernantoj. Dankon, Boris, por via admirinda libro kaj la tuta kurso. Kvankam mi estis komencanto, mi faris tiun vojaĝon en Esperanto-lando sufiĉe rapide kaj eĉ sukcesis trapasi internacian ekzamenon dum la 91a Universala Kongreso en Florenco. Mi esperas, ke pli da esperantistoj ekdeziros fari kun vi tiun mirindan vojaĝon.

**Urszula Kwaśniewska**

Boris Kolker: Vojaĝo en Esperanto-lando: Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo. Tria eldono reviziita, kun indekso de nomoj, riĉe ilustrita. Eld. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 2005. 280 paĝoj. ISBN 92 9017 088 3. Prezo: 18 eŭroj + afranko.

Czesław Baranowski

## La prepozicio EL en praktika uzado

Tiu ĉi prepozicio, logike kontraŭa al **en**, estas montranta:

**1. Movon for de interno al ekstero (de limigita spaco aŭ de ia objekto).** Ekz.: Dum la lastaj jaroj multaj gejunuloj elmigris **el** Pollando. Fiŝistoj eltiris matene sian reton **el** la maro. La infano elrampis **el** la lito kaj nokte eliris **el** la domo. La kadukulo ne sukcesis leviĝi (sin levi) **el** la fotelo. Printempe la suno tiras malsekecon **el** la grundo. La birdeto elŝovis sian kapeton **el** la nesto. Ĉiu bebo nuda eliris **el** la ventro de sia patrino. Vidante ŝin sur la perono li rapide elsaltis **el** la vagono. Neniam elvoku lupon **el** la arbaro.

**Rimarko:** La prepozicio **el** iafoje troviĝas antaŭ alia prepozicio. Ekz.: **El sub** la kanapo la muso kuris **sub** la liton. Ne ĉiam impresas rakontoj **el trans** la montoj. **El inter** la arboj eliris ĉasisto kun sia fidela ĉashundo.

**2. La antaŭan staton de io, kio ŝanĝiĝis kaj aliĝis.** Ekz.: **El** la knabo li fariĝis junulo. Ŝi multe gajnis **el** la nova harararanĝo. Li faris **el** ŝi la plej feliĉan estaĵon **sub** la suno. Ne ĉiuj homoj sciopovas levi sin **el** malfacila vivsituaĉio. **El** la mizero multaj faras virton. Ni trafis **el** **sub** la pluvo en riveron. Malfacile estas fari ion **el** nenio. Ne **el** ĉiu ligno oni povas fari violonon. **El** la fajraĵo restis nur fajrero. Alarmsireno ŝiris nin **el** profunda dormo (= ni subite vekigis).

**3. La abstraktan, metaforan origi-**

**non, devenon aŭ fonton.** Ekz.: **El** kie vi estas? (= De kiu loko vi devenas?). Restis malmultaj monumentoj **el** la antikva tempo. Mi konas multajn rakontojn **el** la Biblio. Pri aktuala laboro de la registaro mi sciigas **el** la gazetaro. Ŝi parolas **el** la koro kaj desegnas ofte **el** la memoro. La gepatroj scipovas legi ĉion **el** ŝiaj okuloj. Aliuloj neniam sukcesis elpumpi **el** ŝi la sekretojn. **El** la pasinta tempo ni ĉerpu instruon, sed la pasinta doloro estu for **el** memoro. Oni tradukis multajn librojn **el** la pola lingvo en Esperanton. **El** la lingvo internacia Esperanto la homaro povas tiri profiton.

**4. La kaŭzon de sento aŭ ideo, la bazon de rezono (rezonado).** Ekz.: Mi ne scias, **el** kia kaŭzo vi ne venis al mi. Ĉu vi faris tion **el** (pro) simpla kaprico? Oni diras, ke virino povas ĉion fari **el** amo. Ŝi intencis mortigi sin **el** nekonata kaŭzo. Eble **el** kaŭzoj pure financaj li malofte forveturas eksterlanden. Mi **el** tio konkludas, ke li bezonas financan helpon. Oni ne devas konkludi **el** unuopa okazo al ĝenerala principo. **El** simpla neceseco oni povas ankaŭ fari virton. **El** (pro) manko de persisto multaj prokrastis sian poresperantan agadon.

**5. La grupon aŭ amason, kiam oni distingas aŭ apartigas iujn individuojn de la grupo, aŭ parton de la amaso.** Ekz.: La kronika kataro de konjunktivo estas unu **el** la plej oftaj malsanoj de la okuloj.

El pluraj faktoj elfluas ĝusta konkludo. El ĉiuj miaj infanoj ŝi estas la plej talenta. Tio estis la plej bela tago el (de) mia vivo. Ŝi kantas plej bele el ĉiuj. La ĉefa el niaj devoj estas fari malbonon al neniu. El du malbonoj ĉiam pli malgrandan elektu. El la tri leteroj unu estis adresita al mi. Kelkaj el miaj geamikoj ekinteresiĝis pri Esperanto.

**Rimarko:** Iafoje oni renkontas la pezan esprimon **el inter**. Ekz.: Li estas unu **el inter** ili. Tute bone sufiĉas sola **el**: Li estas unu **el** ili.

**6. La materialon, kiu konsistigas ion (la erojn de tuto).** Ekz.: Li masonas sian domon **el** brikoj. La urba banejo estas konstruita **el** marmoro. La altaron oni konstruis **el** akacia ligno. Mia ŝatata trinkaĵo estas farita **el** vinberoj. Multaj homoj zorgas pri dieto konsistanta **el** vegetaloj. Ŝi plektis belan kronon **el** printempaj floroj. Mia skribilaro konsistas **el** unu plumo kaj kelke da globkrajonoj. Unu horo konsistas **el** sesdek minutoj. La internaĵo de la tero konsistas **el** fajra maso. La tuta gramatiko de Esperanto konsistas nur **el** dek ses reguloj.

#### **Vortfarado kun la prepozicio „el”**

- **elen** = eksteren el iu loko: Li ĵetis la pilkon **elen**.
- **eligi** = irigi el io: Ĝi estis dramo, kiu **eligi** larmojn el miaj okuloj.
- **eliĝi** = iri el io: Ni **eliĝis** el taksio antaŭ fervoja stacidomo.

**La prepozicio „el” funkcias ankaŭ prefiksoido. Jen kelkaj ekzemploj:**

- **elbati** = eligi per battoj: Li **elbatis** cindron el sia pipo;
- **elĉerpi** = tute elpreni ion el ujo: Laboristoj **elĉerpis** la provizitan akvon;
- **eldoni** = doni elen: Plej malfacile estas **eldoni** la unuan libron;

- **elflui** = flui el io: Tiu ĉi fonto **elfluas** el la roko;
- **eliri** = iri eksteren el iu loko: Ŝi **eliris** kun la gastoj el sia domo;
- **elkonduki** = konduki el io: Li ŝtele **elkondukis** la aŭton el la aŭtejo;
- **elkuri** = elirante, kuri: Ŝi **elkuris** sur la straton;
- **ellerni** = lerni ĝis plena sciado: Por flue paroli oni devas **ellerni** Esperanton;
- **elmigri** = forlasi naskiĝejon por transloĝiĝi en fremdan lokon (landon);
- **elpreni** = preni el io: Li **elprenis** cent zlotojn el la monujo;
- **elsalti** = eliri per eksalto: Soldatoj **elsaltis** el la soldatejo;
- **elsendi** = sendi el iu loko: La nuboj **elsendis** pluvon al la tero;
- **elspezi** = pagi monon por ricevita varo aŭ servo;
- **elspiri** = elpuŝi aeron el la pulmoj: Mi ĉiam **elspiras** aeron per la buŝo;
- **elteni** = rezisti: La arbo falis, ĉar ne povis **elteni** la baton de la ventego.

Jen kelaj proverboj kun la prepozicio **el**, troviĝantaj en la *Proverbaro Esperanta*, prilaborita de Ludoviko L. Zamenhof:

- El sama tero devenas, saman suknon entenas.
- El flamo sin eltiras, en fajron eniras.
- El fremda poŝo oni pagas facile.
- El kanto oni vortojn ne elĵetas.
- El klara ĉielo tondro ekbatis.
- El du malbonoj pli malgrandan elektu.
- El la sama buŝo li blovas varmon kaj malvarmon.
- El lia mano ĉiu monero elglitas.
- El malgrandaj akveroj fariĝas grandaj riveroj.



## Neniu UK en Moskvo 2009

Sojle de la Rusia Esperanto-Kongreso, okazanta en Tiĥvin ekde la 6a de marto, Rusia Esperanto-Unio diskonigis informon pri entuziasma subteno de la Moskva urba registaro al la propono okazigi la Universalan Kongreson de Esperanto de la jubilea jaro 2009 en Moskvo. Formala invito al UEA kongresi en Moskvo laŭplane estos preparita dum la Rusia Esperanto-Kongreso en Tiĥvin. Tamen laŭ la ĝenerala direktoro de UEA en la praktiko estas jam tro malfrue fari inviton por la jaro 2009. Tial la jubilea kongreso preskaŭ certe okazos en unu el kvar proponataj polaj urboj.

Iniciata grupo subtenata de Rusia Esperanto-Unio jam de iom da tempo flegas kontaktojn kun reprezentantoj de la urbestro de Moskvo, kaj laŭ komunika dissendita de REU la unuaj esperigaj rezultoj estis atingitaj jam decembre de 2006.

La agado daŭris post la longegaj novjaraj festoj. Finfine komence de februaro 2007 la dokumentojn aprobis kaj rezoluciiis pri la subteno la urbestro de Moskvo Jurij Luĵkov. Pasintsemajne okazis tre sukcesa renkontiĝo de niaj reprezentantoj kun la moskva ministro pri internaciaj ligoj kaj turismo I. Ordĵonikidze, kiu jam agis por plenumi tiun komision, skribas la prezidanto de REU, Andrej Grigorjevskij, en komuniko publikigita fine de februaro.

Laŭ la sama komuniko, poste okazis alia kunveno, dum kiu reprezentantoj de la Moskva urbestro promesis diversan praktikan kaj materialan helpon por la okaziĝo de Universala Kongreso.

Tamen jam estas preskaŭ certe, ke almenaŭ en la jaro 2009 la Universala Kongreso okazos ne en Moskvo sed en Pol-

lando, simple ĉar eĉ se oficiala invito nome de Rusia Esperanto-Unio estus farita tuj, UEA ne plu havus tempon sendi sian ĝeneralan direktoron al Moskvo por esplori la kondiĉojn.

„Ne ekzistas formala limdato por invitoj, sed koncerne 2009 estas jam malfacile aldoni al la esploroj novajn landojn. La decido devos esti farita plej laste en la Jokohama UK. Mi, kies tasko kiel ĝenerala direktoro estas prepari ĝin, apenaŭ povus trovi tempon por pliaj esplorvojaĝoj en la proksimaj monatoj, kiuj estos por mi la plej prima periodo de la jaro, des pli nuntempe, kiam la ĉefa financa oficisto de la CO konstante forestas pro malsano” — rakontas Osmo Buller.

Ĝis nun ekzistas nur unu invito por la Universala Kongreso 2009, kaj ĝi venis el Pollando.

Ĉar en 2009 oni festos la 150<sup>an</sup> datrevenon de la naskiĝo de L.L. Zamenhof, Pollando kompreneble aperis kiel natura gastigonto de UK kaj sekve ne estis bezono instigi kandidatigojn el aliaj landoj.

Por esplori la kondiĉojn Osmo Buller jam vizitis kvar urbojn en Pollando: Bjalistokon, Varsovon, Poznanon kaj Krakovon. Li tamen ne volas diri ion pri la rezulto de siaj esploroj.

En novembro, dum la kampanjo por savi la esperantlingvajn elsendojn de Pola Radio, Renato Corsetti publike diskutis la ideon ne okazigi la Universalan Kongreson en Pollando, se la elsendoj estos nuligitaj. Nun la elsendoj daŭras en la reto, kaj la ideo pri bojkoto jam ŝajnas forgesita.

**Fonto: Libera Folio**



## **Nova sidejo de ILEI – Pollando**

ILEI-Pollando ĵus ekhavis sidejon en la centro de Krakovo. Ĝi situas ĉe la Jan Matejko-Placo, apud la Akademio de Belartoj, vidalvide al la Barbakano kaj la Floriana Pordego (kiu malfermas la faman Floriańska-straton). La loko troviĝas je 3-minuta pied-distanco de la Ĉefa Stacidomo.

En la sidejo okazados konsultado por E-instruantoj, gvidataj de spertuloj, ĉiusemajnaj konversacioj por komencantaj partoprenantoj de ĉeestaj aŭ Interretaj E-kursoj kaj memlernantoj, estraraj kunsidoj kaj diversaj kunvenoj (ĉefe instruistaj kaj junularaj), lingvaj kaj metodikaj kursoj, seminarioj k.a. Baldaŭ ni lanĉos universitatnivelan metodikan kurson, teorian kaj praktikan, laŭ interesa principo! Estas planata funkcio de informa kaj didaktika biblioteko kun didaktikaj materialoj, ankaŭ de Interreta didaktika biblioteko.

Informo pri la deĵoroj kaj preciza adreso estas publikigitaj en la prilaborata retpaĝo de ILEI-PL:

[www.esperanto-reto.org/ilei/index.html](http://www.esperanto-reto.org/ilei/index.html)

La ILEI-ejo troviĝas maldekstre de la monumento, malantaŭ la domegoj.

**Maria Majerczak**  
**Prezidantino de Pola Sekcio de ILEI**

## **Studsiesio en Bydgoszcz**

Dum la semajno de la 24<sup>a</sup> ĝis la 26<sup>a</sup> de marto, okazis en la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo el la pola urbo Bydgoszcz, stud- kaj ekzamensiesio de la lernojaro 2006/2007.

Kiel oni scias, la oficiala lingvo de tiu lernejo estas Esperanto. En tiu lingvo okazas la plej granda parto de la tuta instruado.

La sesion partoprenis la gestudentoj (ĉirkaŭ cent), el multaj diversaj landoj, kiel Albanio, Uzbekistano, Japanio, Ĉinio, Bra-

zilo, Senegalio, Kamerunio, Tanzanio, Mongolio, Zimbavo, Kenio, Pollando, ktp.

La profesoroj kaj prelegantoj estas ankaŭ el diversaj landoj, kiel Boĵidar Leonov (Bulgario), Mirka Korniluk (Pollando), Marcel Delforge (Belgio), Mara Timermane (Latvio), Andrzej Korniluk (Pollando), Augusto Casquero (Hispanio), Regina Grzębowska (Litovio), Remigiusz Mielczarek (Pollando), Xu Xiao Nan (Ĉinio), Abraham Langoume (Senegalio).

Fine de la sesio okazis la ekzameno, en kiu la gelernantoj devis prezenti kaj defendi siajn diplomverkojn, verkitajn kaj defendotajn tute en Esperanto. La gestudentoj de la tria jaro bakalaŭriĝas, kaj atingas la ŝtatan polan diplomon.

**Augusto Casquero**

## **Informo pri aperonta grand-vortaro**

Mi volas sciigi al vi, ke en aprilo 2007 aperos en Hamburgo (Germanio) Granda Vortaro Germana-Esperanta (Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto). Tiu vortaro enhavas pli ol 160 000 serĉvortojn kaj parolturnojn sur 1679 paĝoj grandformataj kaj do estos la plej granda Esperanto-vortaro iam aperinta en la mondo.

La fama lingvosciencia eldonejo BUSKE-Verlag aperigis jam en 1999 (tuj antaŭ la UK en Berlino) la ampleksan Granda Vortaro Esperanta-Germana (882 pĝ.) kaj estas rete kontaktebla pere de [www.buske.de](http://www.buske.de) (german- aŭ anglalingve).

**Afable salutas vin**  
**la aŭtoro de ambaŭ vortaroj**  
**Prof. d-ro Erich-Dieter KRAUSE**  
**Semmelweisstr. 7/103**  
**DE-04103 Leipzig**

## UEA subtenas la internacian agadon en la Esperanto-urbo

### PREZIDANTO CORSETTI EN HERZBERG

Laŭ invito de la Interkultura Centro Herzberg (ICH), la prezidanto de UEA. d-ro Renato Corsetti, de la 12<sup>a</sup> ĝis la 14<sup>a</sup> de marto oficiale vizitis Herzberg Harz (centra Germanio), unuanime proklamita de la urbestro „la Esperanto-urbo”.

La urbestro de Herzberg Gerhard Walter kunvokis en la urbodomo honore al la vizitanto specialan laborkunsendon kun akcepto, en kiu partoprenis kaj la lokaj skabenoj kaj la gvidantoj de ICH. En tiu cirkonstanco la urbestro konfirmis la pluan subtenon de la urbo al la internacia agado de ICH, dum la prezidanto de UEA emfazis la varman apogon de la monda asocio de la esperantistaro al la dirita agado kaj anoncis, ke ĝi ricevos la oficialan aŭspicion de UEA. Post la kunvido la urbestro regalis la esperantistan delegacion per tagmanĝo kaj samtage ĉeestis kun diverspartiaj politikistoj alian plurhoran kunvenon en la sidejo de ICH.

La loka gazetaro substrekis, ke la Esperanto-Centro Herzberg jam de kelkaj jaroj akiris grandan reputacion pro siaj sukcesoj rilate al publika apliko de la internacia lingvo en la urbo, ĝemeligita al Góra (Pollando). Kiel konate, Herzberg tutjare ofertas fak-seminariojn, studsesiojn, pedagogiajn tagojn kaj vintrosemajnojn, krom sennombraj Esperantaj kursoj por lernejoj kaj plenkreskuloj.

**Informoj:** <http://ic-herzberg.de>

## Deklaro

Poznanaj aktivuloj, kunvenintaj la 28<sup>an</sup> de marto en Poznano deklaras, ke grandaj ŝanĝoj en la pola Esperantujo estas necesegaj. Pola Esperanto-Asocio devas vekigi el longdaŭra letargo, kio postulas necesajn personajn ŝanĝojn, efektivajn edukajn entreprenojn, helpojn al lokaj aktivecoj kaj aktivuloj, prenante ekzemplojn de sukcesaj ARKONESoj, Ago-taĝoj de Varsovia Vento, ktp.

## Invitoj...

### ...al Pelplin

Kocjovia Filio de Esperantistoj en Pelplin elkore invitas por partopreni la **7an Printempan Renkonton de Esperantistoj**, kiu okazos la **19-20<sup>an</sup> de majo 2007**.

La renkonto okazos en: Zespół Szkół nr 1, ul. Sambora 5 (tranokto kaj manĝejo en la sama loko), kotizo 40 zł (pagenda surloke) inkluzivas tranokton, manĝojn, riĉan artan programon kun premioj.

La ĉefa temo de renkonto: **Ĉu valoras okupiĝi pri Esperanto?**

Ni tre volonte akceptos volontulojn kiuj rakontos pri sia esperantistiĝo kaj pri siaj interesaj spertoj (bonaj aŭ malbonaj) rilate Esperanton.

Bonvolu informi pri via partopreno ĝis la 30<sup>a</sup> de aprilo 2007

rete: [jagaw53@poczta.onet.pl](mailto:jagaw53@poczta.onet.pl) aŭ helikpoŝte: Jadwiga Wasiuk ul. Strzelnica 8, PL 83-130 Pelplin.

### ...al Lubniewice

La **XII Lubuŝa Internacia E-renkontiĝo** estas la ĉefa jararangoo de la grupo de espe-

rantistoj el lubuŝa regiono de Pollando. Ni estas Lubuŝa filio de Pola Esperanto-Asocio. Kun la grupo kunlaboras ne nur la esperantistoj rekte ligitaj kun la vojevodia filio de la asocio sed ankaŭ aliaj kunamikitaj samideanoj el najbaraj regionoj, kiuj ofte honorigas niajn ĉiumonatajn renkontiĝojn en Zielona Góra, kie ni iom babilas kaj preparolas agadaferojn.

La Lubuŝa Internacia E-renkontiĝo estas aranĝata por ĉiuj aĝgrupoj kaj celas trankvilan renkontiĝon de esperantistoj lud-babil- kaj ripozcele, pro ĉi tio mi substrekas ke la provizora programo ne estas deviga!

Pasintaj fojoj la kvanto de partoprenantoj estis inter 30 ĝis 100 el Pollando kaj Germanio kaj pasintjare ni gastigis ankaŭ reprezentantojn de Francio, Hungario kaj eĉ Vjetnamio.

Ĉi jare ni ekspektas la gastojn ankaŭ el Ĉeĥio kaj Slovakio.

Pasintaj renkontiĝoj okazis ĉe la lago Sława sed ĉi jare ni ŝanĝis kutimon kaj decidis renkontiĝi ĉe alia lago.

Ni garantias la kontakton kun la lingvo laŭ bezonata nivelo, eblecon ekkoni la lingvon aŭ progresi por komencantoj.

Ni jam scias ke partoprenos la grupo de lernantoj de elementa lernejo kaj gimnazio el Góra, kiuj partoprenas la ĝemelurban pontlingvan projekton.

**Elkore invitas  
la organizantoj!**

## ...al Internacia Metodika

### Semajno/Semajnfino en Herzberg

Post la sukceso de la unua metodika semajno, la Interkultura Centro denove kunvokas **Internacia Metodikan Semajnon** en la mezepoka urbo Herzberg am Harz (Germanio), oficiale nomita „Esperanto-urbo”. La datoj estas: de la 29<sup>a</sup> de junio ĝis la 7<sup>a</sup> de

julio 2007, sed la rapidemuloj povas elekti la solan semajnfino de la 29<sup>a</sup> de junio ĝis la 1<sup>a</sup> de julio.

Dum la Seminario — kiu celas la praktikan pliprofundigon de la pedagogiaj kaj lingvoinstruaj lertoj kaj konoj de E-instruistoj, instruantoj kaj klubgvidantoj — la partoprenantoj trejniĝos pri kernaj aspektoj de moderna lingvoinstruado, okupiĝos pri lingvopolitikaj demandoj kaj pri la novaj normoj de la „Komuna Eŭropa Referenckadro”.

Ne temos pri prelegoj

Ne temos pri sinsekvo de prelegoj, sed pri kunagado en etaj grupoj, prezento kaj observado de provlecionoj, k.s. Tial, la seminarianoj devos posedi minimume meznivelan lingvoscion de Esperanto kaj preti je aktiva kunlaborado.

La aranĝon gvidos Zsafia Korody, Katalin Kovats (ambaŭ el Hungario) kaj Sylvain Lelarge (Francio) de [www.edukado.net](http://www.edukado.net).

Por informoj kaj aliĝoj konsultu:

<http://ic-herzberg.de>

aŭ: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de).

## ...al Krakovo

Krakova Societo Esperanto elkore invitas partopreni en **XXIV Esperantaj Tagoj de Krakovo** (1–3.06.2007).

### En la programo:

- ☆ prelegoj
- ☆ aŭtoraj renkontoj
- ☆ recitaĵoj
- ☆ koncertoj
- ☆ Esperanta koruso KAMEA
- ☆ vizito en Muzeo al Stanisław Wyspiański
- ☆ ekskurso kaj promenoj tra la urbo
- ☆ Esperanta S-ta Meso.

Dum la aranĝo funkcios libroservo kaj kafejeto en la Kulturdomo „Podgórze” en Krakovo ĉe l. Krasickiego–str. 18–20.

Por translokiĝi en Krakovo plej ekonomie estas aĉeti 24-horan bileton kontraŭ

10,40 zl (rabatan — 5,70 zl), aŭ 48-horan biteton kontraŭ 18,80zl (rabatan — 11,50 zl), ĉe tramhaltejo apud Ĉefa Stacidomo. Unu bileto kostas 2,50 zl (rabata — 1,35 zl).

Tranoktojn oni proponas aranĝi pere de Interreto, vizitante paĝon „Magiczny Krakow” — noclegi, kie vi trovos abundegan ofertan kun la prezoj.

Inaŭguro de la aranĝo: 2.06.2007, je la 9:30 h. En la Kulturdomo „Podgórze”. Akceptado de la alvenintoj de la 9:00 horo, en la sama loko. Aliĝkotizon por la partopreno oni pagos surloke (15 zl).

Bonvolu veni! Vi ne bedaŭros!

## ...al Zawoja

Krakova Societo Esperanto afable invitas partopreni en la **Montara Esperanta Septembro** kiu okazos en la tagoj 1–10 de septembro 2007. La feriado okazos en belega, plej longa en Pollando vilaĝo Zawoja, kondukanta la Babia Góra (Virinaĉa Monto). La loko estas facile atingebla de Krakovo per aŭtobusoj kaj busetoj (ĉ. 2,5 h de vojaĝo kontraŭ 12 zl).

La adreso: 34–222 Zawoja Centrum 1518.

### Dum la restado oni ofertas:

- facilajn kaj malfacilajn ekskursojn montaren
- busan ekskurson al Slovakio
- Esperanto-kursojn por komencantoj, progresantoj kaj kurson konversacian
- vesperajn lingvajn ludojn, komunan kantadon (sub gvidado de fakulino)
- renkontojn kun interesaj homoj
- dancadon kaj bierumadon en lokaj amuz-lokaloj
- bivak-fajron kun konvenaj atrakcioj.

### Kostoj kaj kondiĉoj de la partopreno:

Aliĝkotizo: ĝis la fino de aprilo 2007 — 60,00 zl

ĝis la fino de julio 2007 — 65,00 zl

surloke — 70,00 zl.

La aliĝkotizo enhavas i.a. koston de la ekskurso al Slovakio, estas neredonebla, sed eblas cedi sian aliĝon al alia persono. La monon bonvolu pagi (en polaj zlotoj) al la konto:

Grażyna Porada, BSR Kraków, n-ro:  
15 8589 0006 0001 0029 4047 0001  
kun alskribo „MES-2007”.

Oni rajtas partopreni kaj pli longe kaj pli mallonge ol la planita tempo, sed post pli frua postulo (ĝis la fino de julio).

Unudiurna restado (3 manĝoj + tranoko) en 3 aŭ 4-persona ĉambro) kostas 40,00 zl. Por pli kurta restado ol 5 tagoj la diurno kostas 45,00 zl.

Por tuta restado oni pagos surloke, tuj post la alveno.

La ripozejo konsistas el domo kaj dometo de familio Malik (sume 32 lokoj), kaj en apuda domo de parencoj (sume 30 lokoj).

Al duŝejoj kaj necesejoj oni eniras el koridoroj.

La manĝejo servos poste kiel kunven-salono, oni povas kunveni ankaŭ en la salono por ping-pong en dometo; okaze de bela vetero oni povas kunveni ĉe tabloj en vasta ĝardeno.

Aliĝilojn bonvolu sendi al la adreso: Krakova Societo Esperanto, ul. I. Krasickiego 18–20, 31–515 Kraków, aŭ rete: [kolpand@poczta.onet.pl](mailto:kolpand@poczta.onet.pl).



## Junebre

Kun granda bedaŭro ni informas, ke nia klubano, dumviva esperantisto de PEA **Stanisław Pochanke** foriris de ni la 15<sup>an</sup> de februaro 2007.

De jaroj Stanisław loĝis kun sia familio en Svislando, kie Li ankaŭ agis en Svisa Esperanto-Societo kaj prezidis ĝis antaŭ

unu jaro la lokan E-klubon en Wil. Nia Kara Amiko restos en nia memoro eterne.

## Geklubanoj el Bielsko-Biała



„Malĝoje, sed dankeme por ĉion, kion li donis al ni, ni adiaŭas mian karan edzon, nian karan patron, avon, bopatron kaj frat-on **Stanisław Pochanke** (1934.07.23 – 2007.02.15).

Li endormis pace post pacience eltenata malsano. Ni dankas al ĉiuj kiuj faris bonon al li dum lia vivo.

En profunda funebro: la familio”.

Stanisław estis prezidanto de nia klubo inter 1989 kaj 2005. Ni ŝatis lian fluan Esperanton kaj liajn viglajn rakontojn pri multaj travivaĵoj en Esperantujo. Ni estas malĝojaj pri tiu perdo.

Nome de la Esperanto Klubo Wil

**Wolfram Fischer–Schmitter**  
kaj **Verena Chaves–Walder**



La 6<sup>an</sup> de marto 2007 finis la surteran pilgrimon kaj foriris al Dio s-ino **Anna Kowara**. Nur kelkaj monatoj mankis al ŝia kvindekjariĝo.

Anna naskiĝis en Skierniewice la 10<sup>an</sup> de julio 1957. Jam en junaj jaroj grave malsaniĝis, estis paralizita kaj memstare ne povis moviĝi. Malgraŭ ĉio interesis ŝin ĉiuj aferoj de la mondo kaj lingvoj. En 1987 jaro Anjo partoprenis korespondan kurson de Esperanto laŭ la lecionoj publikigitaj en la revuo „Nowa Wieś” (Nova Vilaĝo). Esperanto fariĝis por ŝi la fenestro al la larĝa mondo. En tiu ĉi tempo en Skierniewice agis aktiva grupo de esperantistoj. Jam en 1977 jaro s-ino Honorata Szulc kun kelkaj entuziasmuloj organizis memklerigan Esperantan rondon, kiu transformiĝis poste en la urban filion de PEA. Anna kontaktiĝis kun ge-

samideanoj kaj ricevadis de ili la helpojn en la lernado de la lingvo. Krome s-ino Szulc regule vizitadis la novan samideaninon en ŝia hejmo. Anjo estis tre kapabla kaj talenta. Baldaŭ ŝi komencis eĉ verki belajn kaj interesajn poemojn en Esperanto. Ŝi posedis vere poetikan talenton. Dum kelkaj jaroj ŝi kunlaboris kun Esperanto-Redakcio de Radio Vieno, kaj ĝis la fino de la vivo korespondis kun geamikoj el diversaj landoj.

Kiam pro la atrofio de la muskoloj ŝi ne scipovis jam teni la skribilon en la manoj, Anjo skribis pere de globkrajono tenata en la dentoj.

Dum 11 jaroj vizitis ŝin en ŝia hejmo bonkora, grandanima samideano Georgo Suchno, ĉiam preta helpi, konsili, kuraĝigi en pezaj momentoj. Li deziris, por ke Anjo ne perdu kontakton kun la mondo kaj la homoj, kun la aferoj, kaj antaŭ ĉio kun la amata lingvo Esperanto kaj gesamideanoj. Do li diskutis, ludis ŝakon kun Anjo, legis leterojn, artikolojn ktp.

Anna Kowara nun rigardas nin el la ĉielo, sed restis ŝiaj versaĵkolektoj, kiuj dank’ al ŝiaj amikoj estis eldonitaj. Unu el ŝiaj libretoj havas titolon „La poemoj kun dediĉoj”, alia „La memoroj kaj la revoj”. Ankaŭ en Japanio aperis libro de Anna Kowara en brajla skribo. Kelkaj ŝiaj versaĵoj aperis iam en „El Popola Ĉinio” kaj en japana revueto „La Zelkovo”. Ŝi planis eldoni ankoraŭ la ciklon de mallongaj poemoj „La haikaj motivoj”.

Bedaŭrinde, la akutiĝo de la malsano interrompis pluan laboron.

Anna Kowara nomata de geamikoj Siringo, ĉar estis ĉiam serena, delikata kiel la floroj en la siringarbusto, ne sukcesis jam renkonti la printempon de 2007 jaro, sed ŝi disfloris en la ĉielo kaj ĝojigas la okulojn de anĝeloj.

**Bogusław Sobol**



## Pola Esperantisto

sendependa revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare,  
eldonkvanto (nakład): 300 ekz.

N-ro (26) 2/2007 — ISSN 0032-2431

redaktas: Tomasz CHMIELIK, Kazimierz LEJA (ĉefredaktoro), Lidia LIGĘZA.  
konstantaj kunlaborantoj: Czesław BARANOWSKI, Danuta KOWALSKA,  
Teresa NEMERE, Stanisław ŚMIGIELSKI.

Ĉiujn korespondataĵojn kaj kontribuojn sendu al la Eldonejo HEJME.

TTT-paĝo: [www.hejme.com.pl](http://www.hejme.com.pl); retpoŝto: [hejme@hejme.com.pl](mailto:hejme@hejme.com.pl)

tel. (+48) 0602 277 604

*La redakcio rezervas al si rajton mallongigi kaj korekti la tekstojn.*

*Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al:*

**Wydawnictwo Hejme, PL 41-250 Czeladź, str. Wąska 21, skrytka 59**

**mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644**

*Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR (prioritate: 18,00 EUR) pagenda al:*

**landaj perantoj:** (konsultu vian landan organizon);

**supra banko-konto:** (BIC/SWIFT: BREXPLPWWMBK) kun plena nomo kaj adreso;

**UEA-konto:** <kazl-s> de Kazimierz Leja. Nepre informu nin pri via pago!





Diversaj formoj de aktiva-  
do: kial ankoraŭ ne en via  
regiono?